

# EL POPOLA ĈINIO

中國報道

9  
2000

ISSN 0032-4361

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA

KUL

Esp.  
ŝ-19034/2000

Kongreso por lingvo kaj kulturo de paco  
Kion ni vidis kaj aŭdis en Gaocheng?  
Miaj kamparanaj gepatroj

# EL POPOLA ĈINIO



Kongreso  
por lingvo  
kaj kulturo  
de paco **33**



Avino  
vizitas  
lernejojn **40**




“Kuracistoj  
de ŝtataj  
trezoroj”

Kion ni vidis  
kaj aŭdis en  
Gaocheng? **14**



**29**



**24**

Vizito al  
dong-oj

# ENHAVO

## 3 INTER NI

4 Ekologia insulo

6 Unua vilaĝo ĉe la fonto de Jarlung Zangbo

## 8 50 JAROJ — EPĈ:

“Mi vin salutas, via ĉina amiko Eltunko”; Ĉinio estas ne fora

## 10 ESP-NOVAĴOJ

11 Miaj kamparanaj gepatroj

20 Stupao de kvar japanaj bonzoj

## 21 NUNTEMPA BELARTO:

Pupoj el tablotenisaj pilkoj

## 28 POR KOMENCANTOJ:

Reto de vivo

## 32 KURANTAJ AFEROJ

37 La deka konkurso de EPĈ-legado finita

38 Plansetlejo en Pekino

## 42 EL ĈINAJ GAZETOJ

## 44 TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ:

Kial geedza paro havas nur unu infanon?

## 46 SUR NIA LIBROBRETO:

Majstra traduko de majstra romano

48 Muzikantaj ŝtonoj

## 50 POR VIA SANO:

Saniga gimnastiko de Shen Junru (II)

## 51 ĈINAJ POŝTMARKOJ:

Printempa festo

## INTER NI

Leteroj de niaj legantoj tuŝas ofte diversajn temojn kaj kondukas nin al pripensado. Tio estas tre utila al nia revuo. Sube legiĝas kelkaj linioj el du tiaj leteroj.

S-ano Boris Sokolov el Rusio skribis al ni, ke en la lastaj jaroj nigra-blankaj bildoj de EPĈ estis anstataŭitaj de la koloraj. Oni eĉ povas legi la revuon en interreto, kiu helpas propagandi Esperanton.

S-ano Jose Roiz el Brazilo letere prezentis al ni sian opinion pri la artikolo “Lando de longvivuloj” de la 9-a numero de 1999:

“Unufoje povas ŝajni ke stomako kaj intestoj havas nenian rilaton al profunda spirado, aŭ pli bone, ke tiu ne povas plibonigi tiujn du partojn de la digesta aparato. Sed se pankreato, stomako kaj intestoj tage ricevas iomete pli da oksigeno, tiuj organoj povas produkti iomete pli da digesta enzimo, ĝuste la kvanton, kiu mankis por ke ili funkcii iomete pli, kaj malaperu citita manko. Ricevante pli da oksigeno, ankaŭ limfocito povas produkti iomete pli da antikorpo kontraŭ kancera ĉelo.”

La Red.



En universitato por maljunuloj  
Foto de Zhao Xi

En Ĉinio la nombro de maljunuloj konsistigas 10% de ĝia totala loĝantaro (1.2 miliardoj). En la urboj gravas bona aranĝo de la spirita vivo de la emeritoj. Hodiaŭ la registaro de plansetlejoj penas igi ilian spiritan vivon enhavoriĉa kaj signifoplena, por ke ili sentu sin utilaj, ĝojaj kaj feliĉaj. Jen maljunaj lernantoj de la pentrarta kurso en universitato por maljunuloj.

## EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata

de Ĉina Esperanto-Ligo

Redaktata de Redakcio de  
“El Popola Ĉinio”

Distribuata de Distribua

Fako de “El Popola Ĉinio”

Direktoro: Wang Xifu

Adreso: P.O. Kesto 77,

Beijing 100037, Ĉinio

Telefono kaj telefakso:

+86-10-6832 1808

Retpoŝto:

epc@china-report.com

Hejmpaĝo:

<<http://www.china.org.cn>

/ElPopolaCxinio>

# 9[504]2000

# Ekologia insulo


Post ĉ. 30 jaroj la provinco havigos al si evoluintan ekonomion kun racie aranĝitaj ekologiaj pejzaĝoj kaj medio por la homa loĝado, por ke ĝia ekonomia forto kaj sinteza konkurenca kapablo estu enlistigitaj en la unuan vicon de la avangardaj provincoj kaj la media kvalito estu daŭre inter la unuaj de la lando.

Teksto kaj fotoj de  
ZHANG QINGZHEN

**S**UR Hainan-insulo ĉie vidiĝas kokosarboj, karesataj de humida vento. La insulo forte impresas per kvieteco. Oni povas diri, ke ĝi estas granda pura tero en Ĉinio.

S-ro Du Qinglin, gvidanto de Hainan-provinco, diris, ke estas grava strategio fari Hainan ekologia provinco. Li diris ankaŭ, ke tio ne signifas fari la medi-protektadon ekskluzive, sed komplete praktiki la strategion por longdaŭra disvolviĝo kaj atingi unuiĝon de la mallongperioda profito kun la longperioda kaj disvolvi efikan ekologian ekonomion per modernaj sciencoj, tekniko kaj administrataj metodoj.

S-ro Du konigis, ke la provinco jam ellaboris "Kompendion pri Konstruo de la Ekologia Hainan-provinco". Laŭ la kompendio, post ĉ. 30 jaroj la provinco havigos al si evoluintan ekonomion kun racie aranĝitaj ekologiaj pejzaĝoj kaj medio por la homa loĝado, por ke ĝia ekonomia forto kaj sinteza konkurenca kapablo estu enlistigitaj en la unuan vicon de la avangardaj provincoj kaj la media kvalito estu daŭre inter la unuaj de la lando. La supre menciitaj 30 jaroj estas dividitaj en tri periodojn. En la unua periodo, kiu daŭros 6 jarojn, oni devas doni grandan atenton al solvo de la elstaraj problemoj en la ekologia medio kaj bridi la tendencon pri malboniĝo de la ekologia medio, kaŭzita de homaj faktoroj, kaj meti firman bazon por daŭra konstru-



En banan-ĝardeno

ado. En la dua periodo, kiu daŭros 10 jarojn, oni unuapaŝe faros la insulon ekologia provinco. En la tria periodo, kiu daŭros 15 jarojn, oni komplete plenumos la taskon kaj faros la insulon la plej bona ekologia provinco de Ĉinio.

Laŭ la kompendio la ekologiaj industrioj okupos la ĉefan lokon en la loka ekonomio. Por tio oni devas fari la agrikulturon ekologia produktado kaj industrie oni faros la produktadon komplete en pura medio, kaj la ekologia turismo okupos gravan lokon en la loka turismo.

Dum mia restado en Hainan la tieaj kamparanoj estis rikoltantaj bananojn. Mi vizitis bananan ĝardenon. Oni diras, ke unu bananujo valoras kiel 50 kg da rizo, unu hektaro da bananujoj kiel 15 televidiloj aŭ kiel unu loĝdomo. La diro bone montras la nunan staton de la bonhaviĝintaj banan-


kulturistoj.

Antaŭe en Hainan oni produktis ĉefe grenon, sukerkanojn kaj kaŭĉukon. Nun la altprodukta senpolua agrikulturo fariĝis ĉefa parto de la loka agrikulturo. Por disvolvi tian agrikulturon oni ellaboris tri principojn, t.e. ĉiuj produktaĵoj devas esti facile vendataj, la kamparanoj devas havi pli da enspezo pro tio kaj la tropika agrikulturo devas disvolviĝi harmonie. Por realigi la principojn oni devas venki multajn malfacilojn. Antaŭe oni diris, ke Hainan estas grandega natura forcejo. Ĉia semado alportas rikolton. Estas vere, ke antaŭe Hainan atribuis siajn sukcesojn antaŭ ĉio al favoro de la klimato. Ekz. en la komenco de la 90-aj jaroj 60% de la legomoj vintre bezonataj de nordaj provincoj de Ĉinio venis de sudaj provincoj kaj en tio Hainan ludis gravan rolon. Tamen fine de la 90-aj jaroj la nordaj provin-

coj disvolvis sian legomkultura-  
don en forcejoj kaj ankaŭ sudaj  
provincoj multe disvolvis sian  
legomkulturadon, kaj pro tio la  
agrikulturo de Hainan alfrontis  
seriozan defion. Hainan tuj faris  
reordigon de sia agrikultura struk-  
turo. Sufiĉe utiligante la bonajn  
naturajn kondiĉojn kaj aplikante  
sciencojn kaj teknikon en agrikul-  
turo, Hainan multe produktis ne-  
poluitajn, facile vendatajn legom-  
ojn, tiel ke ĝi levis sian kapablon  
en merkata konkurenco.

S-ro Xiao Ruohai, estro de la  
Agrikultura Buroo de la provin-  
co, diris, ke por daŭrigi la rapi-  
dan kreskon de la agrikultura  
produktado en Hainan oni devas  
praktiki ekologian produktadon,  
t.e. kombini la modernajn scien-  
cojn kun la tradiciaj teknikoj kaj  
en sistema inĝenierio komplete kaj  
racie ordigi kaj organizi la agrikul-  
turan produktadon, akceli la be-  
nignan cirkuladon de la agrikul-  
tura ekologia sistemo kaj realigi  
la daŭran disvolvon de la alt-  
produkta agrikulturo. Por tio oni  
devas rapide plibonigi la internan  
strukturon de agrikulturo kaj  
plilongigi la produktan ĉenon de  
la agrikultura produktado, protekti  
kaj racie utiligi la agrikulturajn  
riĉfontojn, popularigi taŭgan  
sterkadon kontraŭ agrikultura  
poluo kaj aktive produkti nepolu-  
itajn ekologiajn manĝaĵojn.

Por tiu celo estas tre grave  
rifuzi poluon. Tio faris severan  
postulon al la industria disvolviĝo  
de Hainan. Post kelkajara es-  
plorado la provinco decidis  
preni produktadon de ne-  
poluitaj manĝaĵoj kaj  
trinkaĵoj kaj ekologiaj  
medikamentoj kaj dis-  
volvon de elektronikaj in-  
formoj kaj maraj aferoj kiel  
ĉefan enhavon de sia dis-  
volviĝo. La granda debito  
de la tie produktitaj famaj  
varoj metis solidan bazon  
por disvolviĝo de la tiea  
industrio. Laŭ postulo de  
la kompendio Hainan de-  
vas observi jenajn princip-



En prilaborejo de natura trinkaĵo

ojn en sia industria disvolviĝo, t.e.  
ne polui medion, ne detruu riĉfon-  
tojn kaj ne ripeti malaltnivelajn  
konstruojn. Pro tio la provinco  
ellaboris jenan politikon, t.e. utiligi  
la lokajn riĉfontojn disvolvi la  
ekologian industrion kun kom-  
paktaj sciencaj faktoroj, utiligi  
modernajn teknikon kaj ekologian  
inĝenierion en reformado de la  
tradicia industrio. Ekz. la Hai-  
kou-a Fabriko de Ladmanĝaĵoj  
havis deficiton en 5 sinsekvaj jaroj  
kaj vizaĝis al bankroto, tamen post  
senhezita reformado kaj reorga-  
nizado ĝi komplete ŝanĝis sian  
fizionomion kaj fariĝis brila ste-  
lo inter la ĉinaj malpezindustriaj  
entreprenoj — Kokosarba Korpo-  
racio (Grupo), la plej granda fa-  
briko de naturaj trinkaĵoj. Nun ĝiaj

varoj vendiĝas ankaŭ en Usono,  
Britio, Japanio kaj aliaj 20 landoj  
krom Ĉinio.

Konstruo de la ekologia  
provinco koncernas ankaŭ tiun de  
la ekologia turismo. En disvolvo  
de la turisma afero la provinco  
devas utiligi kompreneble sian  
bonan ekologian medion. Sen  
bonaj mediaj riĉfontoj perdiĝas  
ankaŭ la bazo de turismo. Oni  
disvolvas en la protekto kaj pro-  
tektas en la disvolvo. Ni prenu  
Nanshan, bonan turisman lokon,  
kiel ekzemplon. Tiu loko, kie la  
maro ligiĝas tuj kun montoj, iam  
estis ekologia turisma loko, okul-  
frapa en Ĉinio. Sur la montoj pro-  
peris primitiva arbaro, vualita de  
nuboj, tamen pro senbrida arbo-  
hakado en la 70-aj kaj 80-aj jaroj  
la loko fariĝis preskaŭ dezerta. De  
tio oni scias, ke por disvolvi turis-  
mon, oni devas antaŭ ĉio reape-  
rigi la ekologian medion. Tiucele  
la loĝantoj de Nanshan faris multajn  
laborojn. Ili malpermesis arbohaka-  
don, denove plantadis arbojn, kul-  
turis belajn florojn kaj herbojn  
kaj rearanĝis fundamentajn  
instalaĵojn kaj ĝardenajn pejzaĝojn,  
tial post nur kelkaj jaroj la loko de-  
nove fariĝis pitoreska. ■



Kulturado de nepoluitaj fruktoj



# Unua vilaĝo ĉe la fonto de Yarlung Zangbo

Li estas indiĝeno, sed jam ne povas bone memori, kiom da malfaciloj illaj prapatroj renkontis kaj kiom da esperoj ili tenadis. La unika kutimo, kiun li heredis kaj tenadis sensange, estas amo al paŝtado kaj sopiro al feliĉa vivo.

de ZHOU BO

**F**RUMATENE, kiam la suno, leviĝinta ĉe la horizonto, karesis per siaj oraj radioj la forajn montojn, tiuj ĵetis longan ombbron sur la fekundan vintran gresejon de la subgubernio Jiela, kaj la unua prujno sur la herboj bunte glimis. Kiam maloftaj aŭtoj trapasis la senbruan stepon, polvo leviĝis kaj longe stagnis en la vasta kvieta spaco. Estis profunda aŭtuno, kaj la supra parto de la rivero Yarlung Zangbo, nomata Maquan, estis klara, sed pli kaj pli peziĝanta friskeco jam estis sentebila.

59-jara Zunzhu, estro de la unua vilaĝo de la nomita subgubernio, eliris el sia jurto farita el felto de nigra gruntbova lano. Rigardante la orumitan gresejon, li profunde enspiris dolĉetan aeron kaj komencis rigar-

di siajn gruntbovaron kaj ŝafaron. Li estas indiĝeno, sed jam ne povas bone memori, kiom da malfaciloj iliaj prapatroj renkontis kaj kiom da esperoj ili tenadis. La unika kutimo, kiun li heredis



Ĉe Maquan-rivero

kaj tenadis sensange, estas amo al paŝtado kaj sopiro al feliĉa vivo.

Kelke da maldikaj lumkolonoj tralikiĝis tra la jurto, kaj en la heleta jurto dommastrino Gesang palpadis por trovi alumeton. Ŝi

bruligis la alumeton kaj ankaŭ la facile bruligeblajn dornojn, por ke brulu la sekigita bovfekaĵo. Jen leviĝis fumkolono sur la kvieta herbejo. Baldaŭ leviĝis blanka vaporo el la kruĉo kun butera teo super la fajrujo. La tuta jurto estis saturita de agrabla varmeco. Ankaŭ la du najbaraj jurtoj ellasis fumkolonon. Nova tago venis al la gresejo.

La tuta familio de Zunzhu rigardis nian viziton plezuro por ili. Iliaj 5 ŝafhundoj, ŝajne influitaj de la humoro de la mastroj, fariĝis multe pli mildaj ol kiam ili teruris nin je la unua vido.

Zunzhu karakteriziĝas per la komunaj trajtoj de paŝtistoj: firmeco, braveco, laboremado kaj grandanimeco. Paŝtante sur altebenaĵo ĉe la fonto de la rivero Yarlung Zangbo kun alteco de 6 000 m. super la marnivelo, Zunzhu estis peze brunigita, sed

tio atestas lian sanon.

Pere de interparolado kun Zunzhu ni havis skizan informon pri la vilaĝo. Ĉe la fonto de Yarlung Zangbo imponas neĝa monto Jiema-Yangzong, ĉe kies piedo troviĝas somera paŝtejo de la unua vilaĝo de Jiela. Pro tio, ĝi portas la nomon "la unua vilaĝo ĉe la fonto de Yarlung Zangbo". La vilaĝo havas 37 familiojn kun 160 membroj. Antaŭe ili nomadis kaj la produktiveco longe restis sur malalta nivelo. La mizeraj paŝtistoj paŝtis brutarojn por mastroj, kaj ili mem havis nur malmulte da brutoj, kontraŭ kiuj ili akiris de nepalaj komercistoj grenon kaj aliajn necesojn por minimuma vivtenado.

Sed la paŝtistoj bone scias el la malnovaj popolrakontoj kaj pastoraloj, ke la gresejo nutrata de Maquan-rivero estas trezorujo. Laŭdire la akvo de Maquan-rivero ŝprucas el la tero kaj ĝia fonto similas al la kapo de ĉeva-

lo, pro tio la rivero portas la nomon Maquan (Tibetlingve Maquan signifas ĉevalkapon). La lokanoj kredas, ke la akvo de la rivero fortigas malfortajn brutojn. Kaj fortaj ĉevaloj trinkantaj ĝin fariĝas pli fortaj kaj kuras flugrapide en belaj pozoj.


Krom la svagaj onidiroj, la reala gresejo de Jiela estas malofta feliĉiga loko. Akvo de degelinta neĝo de la monto fekundigas la gresejon kaj vivo senĉese daŭras sur la gresejo.

Kaj la vasta gresejo ne malesperigis la paŝtistojn, kies laboremo kaj saĝo helpas ilin realigi la revon. En la lastaj 20 jaroj de post la praktikado de reformado kaj pordomalfermo, rapide boniĝis ilia vivo. Nun la meznombra jara enspezo de la vilaĝanoj estas 2 200 juanoj. Plejparto de la familioj de la vilaĝo konstruis domon kaj vivas duonnomade. En la vilaĝo estas 5 grandaj kamionoj por transportado. En la vi-

laĝo Shi Da estas la unua, kiu aĉetis ĵipon produktitan en Pekino.

Por pli efike helpi la paŝtistojn progresigi la produktadon, la registaro de Jiela difinis gresejojn por kvar sezonoj, starigis ĉirkaŭitan paŝtejon kun areo de 20 hektaroj kaj praktikis respondecan uzon de gresejo, por ke la paŝtado estu pli scienca kaj racia. La registaro instigis la paŝtistojn fortigi la komercaĵan koncepton, ke paŝtistoj povas libere fari negocon pri brutoj kaj interŝanĝon de produktaĵoj de agrikulturo kaj brutobredado. Senspertaj paŝtistoj estos helpataj.

Parolante pri la nuna vivo, Zunzhu tuj ekscitiĝis. Li diris, ke en la vilaĝo jam ne estas malriĉulo, ĉiuj familioj havas sufiĉan grenon kaj la diferenco kuŝas nur en nombro de brutoj kaj sumo de ŝparmono. Kaj ilia vivo troviĝas en senprecedenca progreso, same kiel la rivero Yarlung Zangbo. ■



Melkado  
de  
kaprinoj

# “Mi vin salutas, via ĉina amiko Eltunko”


de ADOLF BURKHARDT\*  
(Germanio)

**E**N 1950 aperis la unua numero de "El Popola Ĉinio". Dum la jardekoj, tiu gazeto restis mia plej fidebla ligilo al ĉinaj aferoj kaj al ĉinaj homoj (kvankam multo el ĝia enhavo estis diametre kontraŭa al miaj konvinkoj). Sed mia unua persona kontakto kun ĉino estis antaŭ kelkdek jaroj. En printempo de 1947, kun kelkaj samklasanoj, mi komencis aŭtodidakte lerni Esperanton kiel gimnaziano en eklezia lernejo. Kaj mia unua korespondanto estis ĉino! La 11-an de septembro 1947, Eltunko el Chengdu verkis longan, tutpaĝan leteron. Kaj la 3-an de novembro 1947 oni ĝin enmanigis al mi, publike, antaŭ la tuta klaso (ĉiutage, la deĵoranta instruisto post la tagmanĝo disdonis la alvenintan poŝton). Kun ioma timo mi kaj miaj amikoj malfermis — niaj instruistoj ja asertis, ke tia lingvo ne eblas. Kaj kion fari, se ili pravus? Sed de la unua linio mi kaj miaj kunlernantoj ĉion perfekte komprenis: "Kara Samideano! Min tre admirigas la fakto, ke en la eksregno de la 'Führer' nun tiom prosperas la verda movado. En la nuna somero mi sola jam ricevis pli ol dekduon da leteroj de germanaj esperantistoj. Mi devas ĝemspiri pri la movado en mia patrio, kies registaro diktata de Ĉiang Kajŝek, la ĉina Führer, ankoraŭ persekutas nian aferon; la ĉina Esperantomovado estas sufokata. Nu, certe vi komprenas, ke mi sentas ĝojon legante vian leteron." Mi tute ne memoras, kion mi skribis en

mia kontakta leteron. Sed la leteron de Eltunko mi pie konservis pli ol duonan jarcenton ĝis la nuna tago, same la koverton. Li poste sendis numeron de gazeto bele kaligrafita de li mem "El Ĉina Muziko". Parkere mi povas citi el ĝi: "Ho, kial baroj en la tuta mond'?"

"Mi vin salutas, via ĉina amiko Eltunko." Tiel li finis sian unuan leteron.

Tamen la kontakto al Eltunko baldaŭ rompiĝis, mi ne sciis kial. Nur multajn multajn jarojn poste, ordigante malnovajn gazetojn por la biblioteko de Germana Esperanto-Instituto, mi eksciis la krue lan veron. En iu numero de ĉina gazeto mi vidis foton kun la tristita raporto pri la murdo al Eltunko en prizona ĉelo. Tio okazis verŝajne eĉ antaŭ la apero de "El Popola Ĉinio". Mi suspektas, ke neniam efektiviĝis, kion li skribis al mi: "La registaro de la urbo (Chengdu) persekutas la demokratojn, ĝi malamas la esperantistojn kiel esencajn demokratojn kaj internaciistojn, ĝi persekutas ankaŭ min, tial mi volas forveturi al Hongkong, kie malgraŭ la brita imperialisma regado (Hongkong estas ĉina tero okupita de la angloj) mi povos fari pli multe por la ĉina Esperantomovado, mi tiel esperas."



La aŭtoro

En la sudgermana urbeto Aalen troviĝas unika biblioteko: kion ofte neniu universitata biblioteko en la tuta Germanio povas provizi al petanto, jen tio staras sur la bretoj de Germana Esperanto-Biblioteko, la komuna kolekto de la germanaj Esperanto-organizaĵoj.

Kaj tie oni senmanke trovas

"El Popola Ĉinio", de la unua numero en la senornama ĵurnala formato ĝis la nunaj prestiĝaj koloroj. Kun ioma fiero, mi povas diri, ke ĉiu unuopa numero pasis tra miaj manoj! La lastajn truojn, kiuj, strange, estiĝis dum la lasta jardeko de la pasinta jarmilo, afable ŝtopis pasintjare la redakcio mem.

Estis por mi interesa fenome-

no, helpe de EPĈ, sekvi la evoluon de la politika situacio, jam laŭ la titolpaĝoj. Unue ĉarmis ĉinstilaj pentraĵoj, poste tede kaj ripete ĉiumonate aperis la sama vizaĝo — Mao. Kaj kiam ĝi maloftiĝis, tio signifis klaran anonciĝon de io nova. Unu aspekto tamen frapis de la unua momento ĝis la plej lasta: la ama zorgo pri bona lingvo kaj bona prezento. Nenia hasta eraro-plena aranĝo de la enhavo! Por mi tiu daŭra kaj rekta kontakto kun ĉinaj aferoj ne povus okazi sen la laboro de la redakcio de EPĈ, en ĉiuj epokoj. Tre longe ili restis anonimaj. Eble okaze de la jubileo ni, la legantoj de 50 jarkolektoj, ricevos rigardon post la kulisojn. ■

\* Direktoro de la Germana Esperanto-Biblioteko kaj prezidanto de la Kristana Esperanto-Ligo Internacia



# Ĉinio estas ne fora

de ERKKI RÖNTYENEN  
(Finnlando)

**N**UN nia mondo pli kaj pli "malgrandiĝis". Ne troviĝas "foraj lokoj" kiel antaŭe. Aeroplanoj rapide flugas trans marojn, montojn kaj dezertojn. Mesaĝoj vigle kuras per kabloj, antenoj kaj satelitoj el unu loko al alia. Interreto permesas ĉeeston samtempan sur ĉiu kontinento.

Ankaŭ Ĉinio, laŭ mia vidpunkto, ne estas "fora" loko, kvankam mi neniam vizitis la landon. Sed feliĉe troviĝas informkanaloj, ĉi-kaze Esperantaj, kiuj peras sciojn i.a. el Ĉinio.

Mi tre ĝojas, ke per EPĈ mi havas eblecon malfermi pordojn al konatiĝo de la ĉina historio kaj kulturo, al ĉiutaga vivo de la popolanoj. Ĉi tio gravas ankaŭ pro tio, ke en la nuna mondo ni ĉiuj estas ekonomie fiksitaj al la sama fadenaro. Se iu tiras unu fadenon, ĉiuj aliaj sentos ĝin.

Kiam mi antaŭ pli ol 20 jaroj aŭdis kaj legis pri la nova ekonomia slogano de Ĉinio, "la politiko de reformado kaj pordmalfermo", mi pensis, ke temas pri nur unu slogano el tiuj, kiuj estis tipaj en tiamaj socialismaj landoj. Katastrofa kultura revolucio finiĝis, estis bezono krei ion novan.

Nun mi samopinias kiel EPĈ (8/99): "En 1978 Ĉinio realigis alian alian historian turniĝon."

Ĉi tiu turniĝo sukcesis bone. Dum 20 jaroj Ĉinio ekonomie disvolviĝis rapide kaj stabile. Fruktoj de la sukceso vidiĝas ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en aliaj landoj. La forta ekonomia situacio de Ĉinio helpis al aliaj orientitaj landoj, kiuj iom post iom levas sin el plej severa krizo.

Bedaŭrinde disvolviĝo enhavas ankaŭ negativajn trajtojn.



La aŭtoro

Apenaŭ neniu sciis aŭguri en la komenco de la nova Ĉinio antaŭ 50 jaroj, kun kiaj problemoj la ĉinoj hodiaŭ luktas. Eĉ se vivnivelo rimarkeble kreskis kaj ĝenerala bonstato de la popolo pliiĝis, troviĝas problemoj, kiuj atendas novajn sukcesajn "historiajn turniĝojn".

Temas pri problemoj, kiuj ĝenas preskaŭ ĉiujn landojn: senlaboreco kaj diversaj socialaj malfacilaĵoj, kiujn koncentrita produkto kaj troa urbanizado estigis kaj okazigos. Bedaŭrinde bonstato ne samegale trafas ĉiujn. Estas bone, ke EPĈ informis la legantojn ankaŭ pri ĉi tiuj flankoj de la problemoj.

Eble iuj pensas, ĉu gravas vaste scii, kio okazas en iu lando. Sed sen scioj ni ne kapablas bone kompreni unu la alian kaj ni ne povas forpuŝi antaŭjuĝojn, kiujn ni ĉiuj kunportas almenaŭ senkonscie.

Naturprotekto, internacia kunlaboro kaj interkompreniĝo

kaj respondaj ceteraj nocioj apartenas al la internacia kulturo, kiu intime aliĝas al demandoj pri paco. Ne estas hazardo, ke Unuiĝintaj Nacioj proklamis la jaron 2000 la *Internacia Jaro por la Kulturo de Paco* kaj la periodon 2000-2010 la *Internacia Jardeko por Kulturo de Paco kaj Ne-Perforto*.

Mi kredas al la tradicia idealo de Esperanto, kiu emfazas, ke forpuŝante i.a. lingvajn barojn eblas konstrui novajn pontojn inter homoj, nacioj kaj ŝtatoj. Ni ja scias, ke lingvo estas nur unu flanko de gravaĵoj, sed ĝi estas nia mola armilo, per kiu ni povas venki niajn proprajn antaŭjuĝojn kaj elmontri ankaŭ al la aliaj vojon por la celo de la monda paco.

Mi gratulas vin pro la 50-jariĝo kaj esperas, ke vi havos sufiĉe da forto daŭrigi vian tre gravan laboron por paco kaj interkompreniĝo kaj peri ankaŭ en la estonteco sciojn kaj novaĵojn en via lando. ■

## ĈINIO

● La 4-an de majo fondiĝis la Eksperimenta Lernejo de la Tianjin-a E-Asocio en Guozhuangzi-mezlernejo. Antaŭ tri



Lernantoj de la Eksperimenta Lernejo de la Tianjin-a E-Asocio

jaroj ekfunkciis E-kurso en la nomita mezlernejo, kun helpo de la Tianjin-a E-Asocio. La E-kurson gvidis s-ino Liu Jun. La junaj e-istoj partoprenis en la E-salono de la asocio, akceptis eksterlandajn e-istojn kaj korespondis kun junaj e-istoj de aliaj landoj. Nun funkcias la nova E-kurso, gvidata de s-ro Han Zuwu, vicprezidanto de la Tianjin-a E-Asocio kaj membro de ILEI/UEA, kaj konsistanta el tridek 14-jaraj lernantoj en la unua klaso de la lernejo. Ili havas E-lecionon unufoje semajne kaj deziras korespondi kun diverslandaj junaj e-istoj. Retadr.: <202.99.67.201>

(Han Zuwu

<hanzuwu@hotmail.com>)

● De la 19-a ĝis la 24-a de junio s-ro Yosimi Umeda, eksa vicprezidanto de UEA, vizitis Pekinon por ĉeesti en la Popola Halo la ceremonion de la Fonduso por Japana kaj Ĉina Kultura Interŝanĝo. Ĉe la bankedo li rakontis al la ĉeestantoj sian 36-fojan vojaĝon al Ĉinio per Esperanto kaj amikan intervidiĝon kun la famaj ĉinaj esperantistoj Hujucz, Bakin, Cicio Mar k.a. Lia parolado ricevis varman aplaŭdon.

Dum sia restado en Pekino s-ro Umeda gastis en la Ĉina E-

Ligo, redakcio de EPC kaj E-sekcio de Ĉina Radio Internacia. Li havis agrablan interparolon kun ĉinaj amikoj malnovaj kaj novaj pri amikeco, E-movado, vivo ktp.

● La 18-21-an de majo 2001 okazos en la te-hejmloko Xinyang, Henan-provinco, la 10-a Xinyang-a Te-festivalo, kiun organizos la loka registaro. Intertempe oni okazigos negocan ekspozicion, artan vesperon, ekskurson, simpozion de E-komerca kunlaboro ktp. Laŭ propono de loka e-isto, oni decidis prezenti mon-

dan te-kulturon dum la festivalo, inkl. de te-ceremonio, diverslokaj moroj de te-uzado ktp. Esperanto funkcias kiel ponto en la aranĝo. E-organizoj kaj e-istoj estos bonvenaj al la festivalo. Pliaj informoj, aliĝiloj kaj invitilo peteblas antaŭ la 20-a de aprilo 2001 ĉe s-ro Zhang Xuesong, Changtaiguan Dianguansuo, CN-464193 Xinyang, Henan, Ĉinio. Tel.: +86-376-8821553 Retadr.: [hnxychyj@public2.lyptt.ha.cn](mailto:hnxychyj@public2.lyptt.ha.cn)

● En la semestroj 1999-2000 la E-instruado de la Dalian-a Universitato konis ĝojigan progreson. En la unua semestro funkciis E-kurso kiel nedeviga kurso de dua fremda lingvo en la anglalingva fakultato de la Fremdlingva Instituto. La 40 E-kursanoj havas 4 lernohorojn semajne (entute 72 lernohoroj) kaj akiris ĉiu 4 lernopontojn. Dum la unua kaj dua semestroj oni funkciigis po unu publikan nedevigan E-kurson por la tuta universitato, kun 3 lernohoroj semajne. Kaj lernis respektive 37 kaj 38 studentoj el pli ol 10 institutoj kaj fakultatoj de la universitato. Sukcesinte en la ekzameno, la E-kursanoj akiris 2 lernopontojn. La lecionojn gvidis vicprof. Wang Tailin, vicdirektoro de la Fremdlingva Insti-

tuto de la universitato.

(Fremdlingva Instituto de la Dalian-a Universitato)

## BULGARIO

● "Vespermesaĝoj" estas kolektaĵoj senditaj de Zoran al amikoj kaj konatoj dum la NATO-atako al Jugoslavio printempe de 1999. Ĝi rakontas pri la aŭtentikaj travivaĵoj de juna e-isto dum militaj kondiĉoj meze de Eŭropo. Persona, originala atesto de junulo, kiu per malfermitaj okuloj rigardas la mondon kaj la politikon kaj plu — malgraŭ la bomboj — esperas kaj laboras por paco kaj protekto de nia Tero. Mendu ĉe: Bambu Ltd, p.k. 405, BG-9000 Varna, Bulgario. <[bambu@mailroom.com](mailto:bambu@mailroom.com)>

(Sabira Ståhlberg)

## HISPANIO

● Naskiĝis en la reto nova ejo, en kiu oni povas persone paroli laŭtvoĉe aŭ skribi, per ĝentila laboro de [www.genteirce.com](http://www.genteirce.com). En tiu loko oni povas libere paroli Esperante. Por partopreni nur sufiĉas eniri en tiu ĉi adreso: <http://www.genteirce.com> kaj eniri en la ĉambro nomita AMIKEJO.

(fjdavila@arrakis.es)

## POLLANDO

● La XII-aj Esperantaj Tagoj de Staszow okazis inter la 25-a



Solena malfermo de la 12-aj Esperantaj Tagoj de Staszów, Pollando

kaj 28-a de majo 2000. Al la malgranda pola urbo venis 36 geesperantistoj el la tuta Pollando. Programo: prelegoj, koncerto, vespera brulŝtiparo, ekskurso ktp. (Andrzej Sochacki)

# Miaj kamparanaj gepatroj

- Printempa semado, somera kaj aŭtuna rikoltoj kaj ankaŭ aŭtuna semado, jen gravaj aktivadoj de miaj gepatroj dum la tuta jaro.
- Mia patrino estis ege kapabla. Ĉiuj litaĵoj kaj vestoj de la tuta familio estis faritaj de ŝi mem.
- Miaj gepatroj sciis nek legi nek skribi, tamen esperis, ke la gefiloj bone lernos kaj havos bonan estontecon.

de WANG HANPING

**N**UR post kiam mia patrino resaniĝis, mi informiĝis, ke ŝin trafis trafika akcidento. Mia fratino diris al mi en telefono, ke la patrino ne sciigis al mi, kiu vivas en tre malproksima Pekino, timante, ke mi maltrankviliĝos pro ŝi. Nun la patrino povas denove labori surkampe. La zorgemo, diligenco kaj ŝparemo de la gepatroj multe emociis min. Preskaŭ du jarojn mi ne vizitis ilin. Tial,

mi tuj hejmen revenis dum la somera rikolto por viziti ilin kaj miajn gefratojn.

Miaj samaĝaj gepatroj havas 68 jarojn. Tiom aĝaj urbanoj emeritiĝis jam antaŭlonge por ĝui la vivon en maljuneco, dum miaj gepatroj ankoraŭ laboras en kamparo. Ili estas ordinaraj el la ĉ. miliardo da ĉinaj kamparanoj.

Mia hejmloko situas norde de la enmariĝo de Yangzi-rivero. Sur tiu tero el malprofundaĵo miaj

gepatroj kulturis 0.2 hektaron da kampo distribuita laŭ la nombro de familianoj. Antaŭ 20 jaroj la reformado de Ĉinio komenciĝis en kamparo per laŭkontrakta terkulturado de familioj. De kolektiva laboro surkampe al la laŭkontrakta terkulturado, miaj gepatroj, same kiel la aliaj kamparanoj, pli kaj pli aktive kaj energie laboras, ĉar la bona rikolto dependas de diligenta laboro de la familio mem. Poste la kamparanoj havas pli kaj pli grandan rajton de terkulturado. Krom pagi la agrikultur-



La gepatroj de la aŭtoro laborantaj surkampe

an imposton, la kamparanoj havas grandan liberecon kion kaj kiel kulturi.

Kvankam la kampo de 0.2 hektaro estas ne granda, tamen al ĝi miaj gepatroj donas sian tutan energion. Por ili tio estas ilia vivo kaj valoro de ilia vivo. Laŭ la metodo de miksa plantado miaj gepatroj zorgeme kulturas sian parcelon. Laŭ malsamaj maturiĝaj periodoj de plantoj ili kultivis unu apud alia maizon, tritikon, fabon, kotonon k.a. Kvankam tia kultivado ne taŭgas por maŝino, tamen multe altigas la produktokvanton, kaj oni povas duoble rikolti jare. Tio ege taŭgas por mia hejmloko, kie estas multe da loĝantoj kaj malmulte da agroj.

Printempa semado, somera kaj aŭtuna rikoltoj kaj ankaŭ aŭtuna semado, jen gravaj aktivadoj de miaj gepatroj dum la tuta jaro. Ili ĉiam leviĝas pli frue ol la suno kaj, post preparado de matenmanĝo, laboras 2-3 horojn. Ili revenas de la kamplaboro, ĉiam post kiam la nokto vualas. Ĉar en mateno kaj vespero abundas roso surkampe, kaj kun tempopaso mia patrino fine suferas de artika reŭmatismo.

Kun tempopaso pli kaj pli malfortaj fariĝis miaj gepatroj. Persvadite de la gefiloj, ili ne plu tiel energie kaj diligente laboras kiel antaŭe. Ili kulturas plantojn facile flegeblajn, tiel en ordinaraj tagoj ili ne havas multon por fari surkampe. Do, mia patrino mastrumas hejme aŭ faras tolŝuojn por la gefiloj kaj genepoj. Kelkfoje ŝi vizitas najbarojn por babilo aŭ ludi kartojn. Kaj mia patro neniam ĉesigis riparadon de tio kaj alio aŭ purigadon. Ŝajnas, ke li neniam ripozas.



Antaŭe la kamparanoj en mia hejmloko laboris ĉiam surkampe. Hodiaŭ, multe ŝanĝiĝis iliaj vivkaj labormanieroj. Plejparto da familioj, precipe tiuj de junuloj,

certe serĉas alian okupon krom terkulturado. Ekz., iuj el miaj gefratoj laboras en fabriko kaj aliaj sin okupas pri komercado. Kaj malofte vidiĝas en mia hejmloko kamparanoj, kiuj sin okupas nur pri terkulturado, kiel miaj gepatroj. Oni malmulte gajnas de terkulturado, sed miaj gepatroj opinias, ke sur la tero oni akiras ĉion, kion oni volas, kaj la riĉaĵo sur la tero estas neelĉerpebla. Ili estas ĉiam kontentaj pri sia memsufiĉa vivo.

En la periodo de kolektiva laboro, miaj gepatroj laboris multe, sed gajnis malmulte. Tiam la produkta brigado disdonis grenon, kiaj maizo, tritiko kaj fabo. Legomoj venis de la privata parcelo ĉe la domo. Kvankam la tiama vivo estis malriĉa, tamen mia familio vivis harmonie, dank' al la diligenteco kaj ŝparemo de miaj gepatroj. En festaj tagoj ni ĝuis fiŝojn kaj viandon, kiujn oni malofte manĝis ordinare, kaj portis novajn vestojn, kiujn oni domaĝis.

En mia memoro mia patrino estis ege kapabla. Ĉiuj litaĵoj kaj vestoj de la tuta familio estis faritaj de ŝi mem. La litaĵoj, kiujn mi portis kun mi al la universitato, estis faritaj de mia patrino. Ili, kvankam provincaj, estis novaj kaj puraj. Hodiaŭ en la ŝranko konserviĝas ankoraŭ amaso da ŝtofoj teksitaj de mia patrino. Por gajni pli da mono, matene mia patro ellitiĝis frue kaj vendis en foirejo legomojn kulturitajn sur la privataj parceloj. Dank' al la penado de miaj gepatroj kaj la aliaj familianoj, mia familio konstruis grandan brikdomon kun kvar ĉambroj. Sed bedaŭrinde por tio mia patro vundis al si lumbajn vertebrojn. Kvankam la domo aspektas iom malnova inter arbare starantaj etaĝdomoj, tamen antaŭ 20 jaroj ĝi estis luksaĵo por multaj.

La vivo de miaj gepatroj nerimarkite ŝanĝiĝis. Pasis la periodo "fari ĉion per si mem". Kaj miaj gepatroj frekventas foirejon kaj la urbeton, ĝuante la oportunon kaj avantaĝon alportitajn de la komerca ekonomio. Ili vendas plejparton da rikoltita greno en foirejo aŭ interŝanĝas ĝin kontraŭ rizo (ĉar en mia hejmloko oni ne kulturas rizon) kaj aĉetas ĉiajn necesajojn en la urbeton.



En Ĉinio cirkulas popoldiroj: "Oni naskas infanojn por sia maljuneco"; "Pli da infanoj, pli da feliĉo". Miaj gepatroj flegis kvar gefilojn. Ili sciis nek legi nek skribi, tamen esperis, ke la gefiloj bone lernos kaj havos bonan estontecon. Por ke ni povu viziti lernejon, ili suferis mult-



La gepatroj de la aŭtoro kaj lia filino

ajn malfacilojn. Ĉiuj miaj gefratoj finlernis en supera mezlernejo, tio ne oftis en mia kampara hejmloko dum la 70-aj jaroj. Por ke la unua filo povu edziĝi, ili sin preparis por konstrui novan domon tre frue. Tio estis la plej granda afero de la familio, ĉar la filo estas apogo de la gepatroj en ilia maljuneco. La filinoj devis edziniĝi, tamen ili estas koro de la gepatroj, kaj la doto estis ne malpli supera ol tiu de aliaj. Nur post kiam ni ĉiuj geedziĝis kaj havas nian propran neston, la gepatroj sentis, ke la ŝarĝo iom malpeziĝis.

La gepatroj nutris kaj edukis



La familio

nin, kaj ni devas danki ilin. Ĉar mi vivas en Pekino tre malproksime de la hejmloko, miaj gefratoj prenis sur sin la taskon prizorgi la maljunajn gepatrojn. De tempo al tempo ili vizitas la gepatrojn, alportante al ili manĝaĵojn, vestojn kaj ĉiutagajn necesajojn. En laborplena sezono ili helpas la gepatrojn. Multajn fojojn mi persvadis, ke la gefratoj forlasu la kamplaboron, venu al Pekino kaj ĝuu la vivon en moderna metropolo, sed ĉiujfoje ili rifuzis mian peton sub la preteksto, ke la hejmo bezonas ilin kaj ili eble ne alkutimiĝos al la urba vivo. Mi scias, ke ili ne volas, ke mi elspezu por ili, kaj cetere ili ne volas forlasi la teron, kiun ili amas.

Ĉi-foje kolektiĝis la tuta familio. Miaj gefratoj kaj mi interkonsentis, ke ni solene festos la 70-jariĝon de la gepatroj en 2002 kaj poste la gepatroj ne plu faros terkulturadon. ■

La aŭtoro (la tria de dekstre), liaj gepatroj kaj filino



La plejaĝa fratino (dekstre) de la aŭtoro helpanta la patrinon en ŝu-farado



# Kion ni vidis kaj aŭdis en Gaocheng?

Kiel unuflanke teni la produktokvanton de greno kaj aliflanke grandigi la enspezon de la kamparanoj? La 650 mil kamparanoj restis tie kaj ĉiu penadis sur sia parcelo de 0.07 hektaro por raciigi la agrikulturan strukturon kaj entrepreni la profitodonan agrikulturon.

Teksto de MA SHENGZHONG kaj LI JING

Fotoj de ZHAO XI

**Ĉ**INIO ĉiujare produktas ĉ. 500 milionojn da tunoj da greno, sed en multaj lokoj de ĝia kamparo, pro la superfluo de tradiciaj produktaĵoj kaj alta produktokosto de greno, aperis la fenomeno, ke la kamparanoj ne pli multe enspezis malgraŭ la kresko de la produktokvanto en pluraj jaroj. Tial oni asertis, ke la kamparanoj ne povas liberigi sin de malriĉeco dependante sole de gren-kulturado.

Kiel unuflanke teni la produktokvanton de greno kaj aliflanke grandigi la enspezon de la kamparanoj? Por respondi tiun demandon, ni vizitis la kamparon de Gaocheng de Hebei-provinco, proksiman al Pekino. Tie la 650 mil kamparanoj ne grandnombre elmigris el la kamparo, sed restis tie kaj ĉiu penadis sur sia parcelo de 0.07 hektaro por raciigi la agrikulturan strukturon kaj entrepreni la profitodonan agrikulturon. 999 ĉiu kamparano enspezis meze 3 576 juanojn, kies 70% venis de agrikulturo kaj prilaborado de

agrikulturaj produktaĵoj. La faro de Gaocheng povas esti ekzemplo de la kamparanoj de aliaj lokoj de Ĉinio, se ili volas garantiĝi grenproduktadon sur la malgranda parcelo kaj samtempe altigi sian enspezon.

Ŝajne la ĉielo ne favoris nin. Ekpluvis, kiam nia aŭto preter-

vojo inter kampoj kaj vidis kamparanon en domo apud la vojo. Li nomiĝas Gu Ruheng. Ni interparolis kun li pri la laboro kaj vivo de la kamparanoj de la loko.

Dem.: Kial vi kulturadas arbojn kaj florojn sur viaj kampoj?

Resp.: Antaŭ kelke da jaroj mi, kiel miaj samvilaĝanoj,

vivtenis min ĉefe per kulturado de tritiko kaj maizo. Sola grenproduktado povis liveri al ni sufiĉan grenon, sed la rikolto sur mia parcelo donis al mi nur 500 juanojn. Mi estas sperta en kulturado de floroj, kaj ankaŭ la registaro instigis nin raciigi la agrikulturan strukturon, por ke la latentaj fortoj de la tero

estu ekspluatata, kaj tiel mia sperto havis la ŝancon ludi indan rolon. En 1989 mi komencis kulturi florojn sur mia parcelo, kaj ĉiujare mi enspezas dekoble pli multe ol per terkulturado. Mi havas pli kaj pli grandan fidon.

Dem.: Ĉu vi ne timas, ke vi ne povos forvendi la florojn?

Resp.: Flor-kulturado dependas de sperto kaj de la merkato. Nia loko ne estas malproksima



Bredado de perdrikoj

pasis la vilaĝon Beigaozhuang. Ni vidis neniun, sed tre belan kamparan pejzaĝon: reto da padoj, forstoj tie kaj tie sur la kampoj, kaj escepte de la kampoj de aŭtuna maizo post la rikolto de tritiko, ĉiuj aliaj kampoj similas al belaj ĝardenoj, kie kreskas diversspecaj salikoj, rozo, siringo k.a., la malgrandaj en vazoj, kaj la grandaj povas ŝirmi kontraŭ la suno. Ni vagadis sur la asfaltita



En kampo de kapsikoj

de nia provinca ĉefurbo Shijiazhuang, Pekino kaj Tianjin (Tianjin estas unu el la plej grandaj urboj de Ĉinio, 100 km. sudoriente de Pekino), kaj la urbanoj bezonas multegon da arbidoj kaj floroj por verdigi siajn vojojn kaj riverojn. Mi faris greftadon en kulturado de arbidoj. Nun multaj kamparanoj sin okupas per kulturado de ornamaj arbidoj kaj floroj, kaj centoj da hektaroj da kampoj estas uzataj por la kulturado. Nia loko vaste disfamiĝis kaj ni havas klientojn eĉ en Hainan-provinco, 3 000 km. for de ni.

Ni adiaŭis Beigaozhuang kaj daŭrigis la veturadon en pluveto. Ni haltis ĉe kampo de dolĉaj kapsikoj. Ho, kiaj prosperaj kreskaĵoj kun abundo da verdaj fruktoj! La mastro de la kampo s-ro Shi plukis unu kapsikon kaj diris al ni: "Tio estas bona vario n-ro 7 liverita de la Ĉina Agronomia Akademio. Ĉiu frukto pezas 200-250 gramojn."

S-ro Shi estas tre sperta en kulturado de legomoj. Li kondukis

nin en sian forcejon. Ni miris, ke ĉiu rampaĵo portas nur unu rondan verdetan frukton, kun reta vejno sur la ŝelo.


"Ĝi estas altklasa melono, kaj mi pagis 3 juanojn por ĉiu semo. Sed ĉiu kg. da frukto kostas 60 juanojn. En la forcejo de 0.1 hektaro mi semis 2 400 semojn, kaj ĉiu frukto pezos 1.5 kg. Mi kulturas dufoje en jaro. Universitato en nia provinco liveris al ni semojn kaj la teknologion. Kaj profesoroj de la universitato helpis nin trovi merkaton. Ni jam subskribis kontrakton kun fremdlandaj komercistoj. Ni estas garantiataj ĉiuflanke kaj certaj je nia enspezo."

Gaocheng estas grava agrikultura bazo de Hebei-provinco. Ekde 1996, kondiĉite de stabila produktokvanto de greno, la provinco iom post iom malmultigis la kampojn por greno kaj multigis la kampojn de 5 300 hektaroj al 16 700 por legomoj kaj aliaj profitodonaĵoj. Por altiĝi la skalon de agrikulturaj produktaĵoj, oni stari-

gis tri regionojn de fruktokulturo, legomokulturo kaj brutobredado. Krome, oni starigis ankaŭ bazon de arbidoj kaj floroj, enkondukis usonan apion, korean tomaton kaj aliajn pli ol 50 fremdlandajn specojn de legomoj kaj fruktoj.


Raciigo de la agrikultura strukturo kaj disvastigo de aplikado de novaj specoj en Gaocheng multe altigis la enspezon de la kamparanoj, kelkoble aŭ eĉ dekoble. Krome, la kamparanoj kulturas sur 13 300 hektaroj da kampoj tritikon tre taŭgan por fari nudelon kaj panon, kaj jam tio altigas la enspezon de la kamparanoj je 20 milionoj da juanoj. Sendube, la kamparanoj daŭre kulturas grenon, sed ili ne estas blindaj kiel antaŭe. Ili jam ellernis fari elekton laŭ la bezono de la merkato kaj laŭ sia propra kapablo. Parto de la kamparanoj de Gaocheng lertas en kulturado de arbidoj kaj floroj, kaj ili sin okupas samtempe per grenkulturado kaj kulturado de arbidoj kaj floroj.

# Kion ni vidis kaj aŭdis en Gaocheng?



Virino kaj infanoj





Gevoj kaj iliaj nepoj



La familio




Sekigado de vestoj ĵus lavitaj



En nova vilaĝo de kamparanoj



Rikoltado de kukumoj



Agrikulturaĵaj libroj ŝatataj



Vendo de melongenoj



En gren-tenejo



Transportado de dolĉaj kapsikoj

Ovoj pretaj transportiĝi



# Stupao de kvar japanaj bonzoj

La stupao, kun originala formo de klabo kaj tritavola sesangula soklo, estis masonita el ŝtonoj de la loko kaj impresas per aplombeco. Ĝia koloro estas malhela, ĝia surfaco efloreskinta, kaj sur ĝia supro kreskas herboj.

de YANG SHIBIN

**A**NTAŬ longe mi sciis, ke en la 14-a jarcento 4 japanaj bonzoj venis al Dali de Yunnan-provinco en la sudokcidento de Ĉinio por studi budhismon kaj post la morto estis entombigitaj ĉeloke. Mi volis esplori la aferon kaj vojaĝis tien kune kun amikoj.

Ni venis al la antikva urbo Dali. La ĉirkaŭaj pejzaĝoj estas belaj. Ni iris laŭ klara rivero kaj venis al bela ĝardeno, ĉar ni aŭdis, ke ĝuste en tiu ĝardeno sidas la stupao. Densaj ombroj de verdaĵoj kaj floroj faris la lokon tre plaĉa. Ni volis havi vojevindanton, sed estis neniuj. Ĉirkaŭe regis kvieteco kaj ni vidis nur kokojn serĉantajn manĝaĵojn.

Mi kaj miaj amikoj devis mem penadi. Altaj vegetaloj malhelpis nian vidon kaj ni ne povis trovi altan lokon por superrigardi. Ni blinde serĉadis tie kaj tie ĝis ŝvitiĝo. Ni sidiĝis apud la rivero por ripozi kaj subite aŭdiĝis parolo de Baj-nacianoj. Ni ekĝojis kaj grimpis sur mildan montodeklivon. Laŭ la sono ni trairis arbaron kaj vidis 7-8 virinojn de Baj-nacio. "Hoj, franjoj, ĉu tie ĉi estas la stupao de kvar japanaj bonzoj?" Rimarkinte tripiedon kaj videoregistrilon, unu el ili demandis nin: "Ĉu vi venis fari televidan filmon? Ĉi tie ne estas stupao, sed estas tombo de fremdlandaj bonzoj. Jen, tie estas." "Jes, ĝuste tion ni serĉas. Bonvole gvidu nin!" Dank' al ilia helpo ni venis al budhisma stupao, kiun la lokanoj nomas tombo.

La stupao situas en la loko 2 080 m. super la marnivelo. Ĝi havas originalan formon de klabo



Stupao de kvar japanaj bonzoj

kaj tritavolan sesangulan soklon. Tia stupao estas tre malofta en Dali. Ĝi estis masonita el ŝtonoj de la loko kaj impresas per aplombeco. Sur la okcidenta flanko de la stupao estas ovala pordo alta je 1.5 m. kaj larĝa je 0.6 m. Kurbiĝante, ni eniris en la stupacon kaj vidis vakan internon kun nenia gravuraĵo kaj skribaĵo. Interne sur la norda muro estas gravurita nemalfermebla fenestro en formato de 0.55 m. x 0.45 m. Ni supozis, ke tie antaŭe estis steleo, sed ĝi perdiĝis pro ia kialo. Rigardate ĉu de proksime ĉu de malproksime, la stupao impresas per soleneco kaj majesteco en la plastiko. La koloro de la stupao estas malhela, la surfaco efloreskinta, kaj supre de la stupao kreskas herboj.

Du lokaj antikvaj libroj notas, ke en la stupao poreterne ripozas 4 japanaj bonzoj, 2 el ili estis anonimaj kaj la aliaj 2 nomiĝis Daikoko kaj Tonan. Meze de la 14-a jarcento ili venis al Dali. Ili estis altkleraj en literaturo kaj kaligrafio. Kiam ili forpasis, la

lokanoj entombigis ilin.

Historiaj dokumentoj notas, ke tiam dekelke da japanaj bonzoj venis al Dali por studi budhismon. Ili estis tre erudiciaj pri budhismo kaj la ĉina kulturo. Ekzemple Tonan estis fama kaligrafo, kaj lia skribmaniero estis nomata Tonan-stilo. Kaj aliaj bonzoj Tensho, Gankisen kaj Daiyo estis tre eminentaj en verkado de poemoj. Iliaj 30 poemoj estis kolektitaj en poeman verkaron de Ming-dinastio (1368-1644), kaj 2 el ili estas vaste konataj en la loko hodiaŭ. Unu el ili temas pri nostalgio kaj la alia priskribas ekskurson de la aŭtoro. Iliaj poemoj evidente karakteriziĝas per trajtoj de Tang-dinastia poezio, kaj ili povas esti kalkulataj "bonzo-poetoj".

La stupao de 4 bonzoj atestis la kulturalan interŝanĝon de la antikvaj Ĉinio kaj Japanio. Ĝi estas bone protektata de la Baj-nacia popolo, kaj tio pruvis la amikecon inter diversaj nacianoj de Dali kaj la japana popolo. ■

# Pupoj el tablotenisaj pilkoj

La nomitaj pupoj kun tradicia strukturo de puparto havas la originan funkcion, tamen estas multe pli facile fareblaj ol la lignaj. Dank' al la sama aranĝaĵo, la aktoroj povas manipuli ilin same kiel la tradiciajn.

Teksto de YE SHITAO  
Fotoj de TONG ZHEN

**L**A pupoj el tablotenisaj pilkoj nomiĝas ankaŭ "tablotenisaj figuroj". Pro siaj apartaj formoj kaj materialoj ili estas rigardataj kiel bela floro en la puparta ĝardeno. Ilia kreinto estas s-ro Tong Zhen, instruisto de la Geknaba Domo sub la Ĉina Bonstatiga Ligo.

Estas atentokaptaj la pupoj versimilaj en la Geknaba Domo. Inter ili estas ridantaj gemaljunuloj, sveltaj knabinoj en palacaj vestoj, kantantaj va-aj knabinoj, energiaj golfistoj kaj ridigaj komikistoj kun ĉapo sur la kapo kaj ledŝuoj sur la piedoj... Tie estas ankaŭ kokoj, sovaĝaj anseroj, anasoj, ŝafoj, leporoj, tigroj, ursoj kaj iuj mitaj herooj, kiaj bonzo Xu-anzang, liaj disĉiploj simio-reĝo Sun Wukong kaj porko Bajie, kiuj pilgrimis al la Okcidento por peti sutrojn.

La nomitaj pupoj kun tradicia strukturo de puparto havas la originan funkcion, tamen estas multe pli facile fareblaj ol la lignaj. Dank' al la sama aranĝaĵo, la aktoroj povas manipuli ilin same kiel la tradiciajn.

Por fari tiajn pupojn oni bezonas solidajn sciojn pri pentrado. Antaŭ la farado oni devas pentri la deziratajn figurojn kaj iliajn movojn sur papero, kio bezonas delikatan laboron. S-ro Tong dediĉas grandan atenton al la personaj karakteroj kaj sentoj de malsamaj infanoj kaj sub lia peniko la pupoj aspektas stulte, dorlotite, gaje aŭ kolere. La malsamaj naciaj moroj estas bone montritaj per iliaj vestoj kaj movoj. Mi

vidis tie dancantajn pupojn tibetaj knabinoj en tibeta robo, dancantan pupon havanta knabino kun girlando kaj kvietan pupon japana knabino kun hartubero sur la kapo en kimono. Unue ili estis pentritaj sur papero kaj poste fariĝis pupoj el tablotenisaj pilkoj. Dum kreado s-ro Tong neniam povas disiĝi de peniko: li devas pentri kaj sur papero kaj sur tablotenisaj pilkoj.

S-ro Tong, sin dediĉanta al la puparta edukado, devenis de pupartista familio. Li elbakis arojn da junaj pup-farantoj kaj pupludistoj, tiel ke la infanoj amantaj pup-teatron ellernis pup-ludadon, sed nur malmulte da infanoj havas la feliĉon esti trejnataj en la Geknaba Domo. Estas ja malfacile fari pupojn per tradiciaj metodoj, kio malhelpis ilian populariĝon inter granda amaso da infanoj. Ĉu oni povas trovi simplan metodon por fari pupojn? Dank' al sia atentema esplorado kaj aktiva praktikado s-ro Tong fine trovis tablotenisan pilkon kaj tiel aperis nova membro de la pupa familio. La farado de pupoj el tablotenisaj pilkoj ekscitis la imagipovon kaj kreivon de la infanoj. Ili ludis siajn proprajn pupojn fiere kaj certiĝis pri sia kapablo. Vidinte tion, s-ro Tong sentis grandan ĝojon. En 1995 la 43-a Monda Tablotenisaj Ĉampioneca Konkurso okazis en Tianjin, Ĉinio. Por bonvenigi la konkurson, sub lia gvido pli ol 50 infanoj de la puparta kurso de la Geknaba Domo faris 120 seriojn da belaj pupoj en duonjaro kaj donacis ilin al ĉiuj teamoj partoprenantaj la konkur-


son. La pupoj similaj al amikeca diplomato gvidis ĉinajn geknabojn en ekskurso tra la mondo. En la Monda Mezlernejana Sportkunveno '98 en Ŝanhajo pupoj el tablotenisaj pilkoj refoje fariĝis multe atentataj de la sportistoj, kiuj tre ŝatis la pupojn, aĉetis ilin kaj portis ilin hejmen.

Por la Sidnejoj Olimpiaj Ludoj s-ro Tong faris 112 elegantajn pupojn de la 56 ĉinaj nacioj dum pluraj jaroj kaj donacis ilin al la ĉinaj tablotenisistoj.

S-ro Tong nun estas ankoraŭ vigla kaj scivolema kiel infano. ■



Kanguruo



Azenoj




Pava danco






Ĉinaj nacimalplimulto en naciaj vestoj

Pupoj



Va-aj knabinoj



# Vizito al dong-oj

- Dong-oj deinfanece montras grandan intereson por muziko. Ilia lingvo havas 16 tonojn kaj ilia parolo estas ritma kiel muziko.
- La prezentado de "granda kanto" de dong-oj en 1996 en Parizo vekis grandan intereson de la spektantoj.

Teksto kaj fotoj de XUE SHI

**N**IA aŭto rapidis sur la Yunnan-Guizhou-a Altebenaĵo en la sudokcidenta parto de Ĉinio, jen sur monto, jen en valo, jen en baseno. Kiam ĝi haltis ĉe klara rivero de la urbeto Chejiang, mi estis ebriigita de la bela verdec. Maljunaj banjanoj kun kronoj en interesaj formoj borderas la riveron. Iliaj branĉoj intertordiĝas kiel anakondoj kaj formas gigantan "baldaknon". Etendante la rigardon sub la arboj, oni povas vidi ponton kaj ŝipojn sub ĝi. Ĉie estas laĝetoj kaj kampoj borderitaj per rulŝtonoj, kaj sur la montodeklivoj supre de la laĝetoj staras surfostaj domoj — jen mi venis en Dong-nacian vilaĝon.

Antaŭlonge mi aŭdis, ke dong-oj ŝatas kanti "grandan kanton": sen dirigento kaj orkestro, dekoj da dong-oj kantas plurvoĉe. El ilia kantado oni povas senti ĝojon de herboj kaj arboj, torentadon de rivero kaj pratempan melankolion. Tial nia plej granda deziro dum la vizito estis aŭskulti kantadon de "granda kanto" de dong-oj.

Sed por proksimiĝi al dong-oj ni faris grandan klopodon. Tiutage grupo da belaj junulinoj baris al ni la vojon kaj kantis: "Vi gastoj ne entrudiĝu, ĉar en nia vilaĝo estas tabuo. Strangaj aferoj okazis: la avinoj ekhavis barbon, la avoj gravediĝis. Eble tiuj aferoj estos malfeliĉaj al vi, tial ni ne devas malfermi nian pardon..."

La humura kaj ridiga kanto embarasis nin, sed feliĉe nia voj-



Tambura turo en vilaĝo de dong-oj

gvidanto estas dong-o kaj bone scias la aferon. Li ekkantis: "En la mondo estas multaj tabuoj, sed neniuj tabuoj rifuzas amikon. Kiu estas via ĉefo, elpaŝu kaj klarigu. Alie vin trafos honto..."

Ĉiuj ekridegis, kaj la junulinoj gaje prezentis vinon al la gastoj.

Post tagmanĝo en la vasta ligna domo de dong-oj, ni iris al la rivero laŭ mallarĝa vojeto pavimita per ŝtonoj. Kelke da knabinoj estis lavantaj siajn harojn per klara akvo de la rivero, juna sinjorino kun bebo sur la dorso plenigis siajn du sitelojn per akvo el la rivero kaj portis hejmen per vekto. Ni sidis ĉe la fluanta akvo kaj murmuris kun espero: "Estas bone, se ni povas aŭskulti 'grandan kanton' de Dong-nacio." Kaj nia vojgvidanto tuj leviĝis kaj petis nin atendi momenton. Post ĉ. duonhoron li revenis kondukante dekkelke da

Dong-naciaj knabinoj kun hartubero. Ŝajne ili ĵus finis kamplaboron, ĉar sur iliaj vastaj pantalonoj estis kotaj makuloj. Ilia bruneta vizaĝo radiis per naiveco kaj timideco. Ili klinis la kapon por interkonsiliĝo kaj subite eksplodis klara kaj dolĉa kanto, kiu ŝvebis inter la rivero kaj banjanoj. La bela kanto vibrigis la koron kaj mi nereteneble eklarmis. La vojgvidanto diris al mi, ke dong-oj deinfanece montras grandan intereson por muziko. Ilia lingvo havas 16 tonojn kaj ilia parolo estas ritma kiel muziko. Antaŭe ilia "granda kanto" estis malmulte konata de alilokanoj, sed nun ĝi estas konata en multaj landoj, kaj la prezentado de "granda kanto" de dong-oj en 1996 en Parizo vekis grandan intereson de la spektantoj.

Tage kvieteco regis en la Dong-nacia vilaĝo kaj ni aŭdis





Pramejo

nur blekadon de ŝafoj kaj bovoj en malproksimo. Avinoj ŝatis rigardi la eksteran mondon sin apogante al la pordokadro de sia ligna domo. Vespere la vilaĝo vigliĝis pro la kantado de gejunuloj. Junuloj kantis ĉe la pordo de la domo de plaĉaj junulinoj. Se ankaŭ la junulino ŝatis la junulon, ŝi kantante malfermis la pordon kaj enlasis lin. Ili sidis apud la fajrujo en la domo kaj pasigis la nokton en babilado kaj kantado. Oni nomas tiun moron "tranoktado en kantado".

Avoj ŝatis babili sub banjanoj. Ili ne komprenis, kial la nunaj gejunuloj ŝatas forlasi la hejmon por serĉi vivrimedojn: "La vivo en la hejmo estas sufiĉe kontenta, ni kulturas grenon sur nia kampo, ni mem teksas ŝtofon kaj mem konstruas lignan domon — kial do ili forlasis la hejmlokon?" Jes, ĉu aliloke estas ligna domo? Sed dong-oj loĝas tuj ĉe monto



Dong-a pentristino en skizado

kaj rivero, kaj ligno por domo antaŭlonge estas pretigita. Kiam la infano estas naskita, la gepatroj tuj plantas por ĝi 100 arbojn. Kiam elkreskas la infano, ankaŭ la arboj elkreskas kaj estas taŭgaj kiel doto por la filino aŭ kiel materialo por konstrui novan domon por la filo.

Kiam la juna generacio de Dong-nacio grandpaŝe eliris el la montaro, alilokanoj venis al la kvieta loko de Dong-nacio por eviti la abomenindan bruon de la

urbo kaj trovi spiritan edonon. Kaj inter ili estis ankaŭ alilandanoj, kiel germana junulo Gass. Li estis doktoro de matematiko, interesata de kompara lingvistiko. Antaŭ 4 jaroj li venis lerni Dong-lingvon. Maljunuloj diris: "Li povas vektoportu grandajn site-lojn kun akvo!" "Li povas legante bicikli!"


Mi tre volis vidi lin kaj iris al lia pasloĝejo. Chunzhu, filino de la dommastro, diris:

"Gass jam iris al Pekino. Li estis tre diligenta kaj liaj kajoroj estis plenaj de vortoj de Dong-lingvo. Li ŝatis manĝi kukon el glueca rizo, kiun li nomis 'Pano Dong'. Ĉe adiaŭo li ploris brakumante mian patrinon. Li diris: 'Panjo, mil dankojn al vi, vi tiom multe faris por mi...'"

Ni devis adiaŭi Chunzhu, kaj ŝi venigis la familianojn por fotiĝi kun ni. Ŝi diris: "Kiam Gass vidis la foton en via gazeto, li tuj komprenos, ke ni sopiras lin." ■




Dong-aj knabinoj prezentas vinon al japanaj gastoj.



Dong-a vilaĝo



Bazaro en la urbeto



Atendo



Dong-a virino tiom šarĝita

# Reto de vivo

**E**N densa arbaro kaj sur vasta stepo vivas diversaj bestoj. Kie abundas plantoj, tie viglas bestoj.

Ĉiuj bestoj vivtenas sin rekte aŭ nerekte per plantoj. Bestoj kaj plantoj havas intiman rilaton. Plantoj liveras al bestoj lokojn, kie bestoj povas ripozi, dum la bestoj helpas plantojn en transporto de poleno kaj dissemado kaj formanĝas malutilajn vermojn.

S-ro Darvino, fama biologo, en vilaĝo de Anglio rimarkis interesan fenomenon: Kie troviĝas multe da katoj, tie dense kreskas trifolioj (*Trifolium pratense*). Kiu rilato ekzistas inter ili? Post longa observado Darvino malkovris, ke la trifolioj dependas de polentransporto far vespoj, sed mielo ellaborita de vespoj estas

ofte formanĝita de kampomusoj kaj pro tio ĉelaroj estas detruitaj. Sekve de tio, kie multiĝis kampomusoj, tie malmultiĝis vespoj, kaj por la trifolioj malpliĝis la ŝancoj transporti polenon. Sed la katoj estas malamikoj de la musoj, tial, kie katoj multiĝis, tie kampomusoj malmultiĝis kaj la trifolioj havas pli da ŝancoj por ricevi polenon kaj dense kreskis.

Ŝajne la katoj havas neniun rilaton kun la trifolioj, sed kune kun vespoj kaj kampomusoj ili fariĝis ĉeno de nutraĵoj.

En la naturo ekzistas sennombraj tiaj ĉenoj el ĉeneroj interkruciĝantaj. Herboj estas manĝataj de ŝafoj, kiuj estas manĝataj de tigroj; ratoj manĝas grenon, strigoj kaptas ratojn... ia

planto estas ofte manĝata de diversaj bestoj, ekzemple herbojn manĝas ne nur la ŝafoj, sed ankaŭ la bovoj kaj ĉevaloj. Besto ofte manĝas diversajn manĝaĵojn, ekzemple la paseroj manĝas kaj grenon kaj vermojn. Same iuspeca besto estas ofte manĝata de diversaj bestoj, ekzemple ne nur la tigroj, sed ankaŭ la lupoj kaj leopardoj manĝas bovojn kaj ŝafojn.

Cirkulas popoldiro: "Granda fiŝo manĝas malgrandan fiŝon, kiu manĝas salikokon, kiu manĝas algojn." Tio estas ofte vidata en la naturo.

En la naturo diversaj vivuloj formas ĉenojn de nutraĵoj. La bestoj kaj plantoj dependas unu de la alia kaj detenas sin reciproke. Ili formas kompleksan reton de vivo. ■



## Nekrologo

Forpasis s-ro Karl Maier, malnova fidela amiko de la ĉina popolo kaj ĉinaj esperantistoj, la 25-an de julio 2000, en sia aĝo de 99 jaroj. Morto por 99-jarulo devas esti nesurpriza, tamen la malfeliĉa informo ege ŝokis nin, ke ni apenaŭ kredis la fakton, ĉar ni estis preparantaj nin por festi lian centjariĝon en februaro de la venonta jaro, kion ni promesis al li dum la Berlina Kongreso, kiam li aspektis tre sana.

S-ro Karl Maier esperantistiĝis en 1924. En 1932 pro persekuto de germanaj nazioj li kaj lia edzino forlasis Germanion kaj migris en Usono kaj Japanio helpe de Esperanto. Fine en la sama jaro ili venis al Tianjin de Ĉinio. Dum sia 22-jara restado en Tianjin li, kiel dentisto, ne nur servis al ĉinaj pacientoj per humaneco kaj alta kuracarto, sed ankaŭ konatiĝis kun tieaj esperantistoj, aktive partoprenis en iliaj aktivadoj kaj amikiĝis kun ili. Septembre de 1955 ili

revenis al GDR. En 1960 li kaj aliaj samideanoj fondis Esperanto-grupon en Orienta Berlino kaj turnis sin al GDR-aj instancoj por atingi oficialan agnoskon. En 1958 li fariĝis peranto de EPĈ kaj la nombro

de liaj varbitoj superis 300 fine de 1961. Septembre de 1987 li kaj lia edzino revizitis Ĉinion, inkluzive Tianjin, kaj estis varme akceptitaj de ĉinaj amikoj malnovaj kaj novaj, kaj tio ege kortuŝis ilin.

Pro forta amo al la ĉina popolo kaj ĉinaj esperantistoj li donacis en 1998 siajn pli ol mil ekzemplerojn da libroj pri Ĉinio al la Ĉina Biblioteko kaj plurfoje promesis donaci duonon de sia deponita mono al la Ĉina Esperanto-Ligo.

Kiel jarcenta maljunulo s-ro Karl Maier travivis multajn gravajn eventojn kaj li pli ol aliaj komprenis la valoron de paco kaj amikeco kaj internan ideon de Esperanto, kaj dum sia tuta vivo li senlace disvastigis nian lingvon. Lia profunda amikeco por la ĉina popolo kaj ĉinaj esperantistoj donos al ni novan impulson kaj ankaŭ konsciigos al ni la devon.

S-ro Karl Maier vivos por ĉiam en nia koro. Pacon al lia animo.

Ĉina Esperanto-Ligo  
Redakcio de "El Popola Ĉinio"




# “Kuracistoj de ŝtataj trezoroj”


Teksto kaj fotoj de JIAO BO

En la Muzeo de Imperiestra Palaco en Pekino estas diligentaj teknikistoj, kiuj silente riparas difektitajn historiajn objektojn. Oni ameme nomas ilin “kuracistoj de ŝtataj trezoroj”.

En ilia laborejo vidiĝas eksterordinaraj “malsanuloj” en diferencaj historiaj periodoj: bronzaĵoj en la periodo Printempo kaj Aŭtuno (770 a. K. - 476 a. K.), kusenoj destinitaj por imperiestra trono de Ming-dinastio (1368-1644), silkaj pentraĵoj de la Okcidenta Han-dinastio (206 a. K. - 25 p. K.). Post ilia riparo la objektoj reakiris sian originan aspekton.



Tiu bronza ujo estis disaj pecoj, kiam oni ĝin alportis el Taiwan.



Riparado  
de antikva  
horloĝo



Riparado de  
bronzajoj



En kopiejo de kaligrafiaĵoj kaj pentraĵoj



Geedzoj, kiuj sin okupas pri riparado de antikvaj objektoj



Garnado de antikvaj pentraĵoj



Cizelado

● La 26-a de junio estas memorinda tago en la homa historio. Sciencistoj el Usono, Japanio, Britio, Francio, Germanio kaj Ĉinio, kiuj partoprenis en la plano pri la homa genaro, deklaris, ke dank' al komuna penado de tutmondaj sciencistoj, oni sukcese faris labor-skeleton pri vico de la homa genaro.

La homoj havas nur unu genaron, kiu konsistas el 50 000-100 000 genoj. La plano pri la homa genaro estis skizita de usona sciencisto en 1985, kun la celo certigi pri la vico de la 3 miliardoj da baz-paroj, malkovri ĉiujn homajn genojn kaj koni ilian situon sur kromosomo kaj deĉifri ĉiujn genetikajn informojn de la homoj, kio estas grava mejloŝtono de la homoj en ilia konado de ili mem, malkovro de la misteroj de la homa vivo kaj levo de la homa san-nivelo kaj disvolvo de sciencoj de la homa vivo. Tio donis ekzemplon, ke la tutmondaj popoloj egalrajte kaj senpage ĝuu la sciencajn fruktojn. Tio estas grava kontribuo de sciencistoj de la mondo.

● Ĉinaj sciencistoj havas gravan atingon pri du ŝlosilaj teknikaj problemoj en la grava astronomia instalaĵo "Sfera Radioteleskopo kun 500-metra Kalibro" farita de Ĉinio. La radioteleskopo troviĝas sur karsta kavaĵo en Guizhou-provinco, sudokcidenta Ĉinio. La akcept-areo de tiu teleskopo estas 10-oble granda kiom tiu kun unusola movebla anteno, la plej granda en la mondo. Dank' al ĝi Ĉinio havas altsensivan kaj altdistingan surteran spuradan kaj teleregan instalaĵon kaj plenigos la blankon de Usono, Hispanio kaj Aŭstralio en distribuo de tri profund-spacaj spurejoj ĉe longitudoj, kaj dank' al tio oni povas realigi la senhaltan teleregan kaj telekomunikadon en 24 horoj tra la tuta terglobo.

● La senbraka roboto sukcese laboris en ĉina maro je 6 000 metroj profunda sub la marsurfaco. Escepte en tro profundaj

markoloj tia roboto povas prospektori marfundajn riĉfontojn en 97% de la tutmondaj maroj.

● La Pekina Presejo de Klasikaĵoj eldonis la valoran kolekton de budhismaj sutroj "Beizang Jing" kompilitan en la erao de imperiestro Yongle antaŭ 600 jaroj.

La kolekto estas la plej bona el la nun konservataj verkoj de budhismaj sutroj. Ĝi havas 1 662 partojn kun 6 930 volumoj. La ĉi-foja reldono estis farita surbaze de la originalo, konservata en la Imperiestra Palaco de Pekino, kaj presita per avangarda holografio. Ĝi estas lukse bindita. La nova eldonaĵo havas altajn valorojn akademian, konservan kaj kultan. Ĉar antaŭe tia libro estis sekrete konservata ĉiam en la palaco, tial ĝia eldono estas alte taksata de la publiko.

● Nun en la mondo konserviĝas ĉ. 30 000 specoj da ĉinaj genealogioj. Duono de ili estas en Ŝanhajo kaj 8 000 en Pekino. En Japanio estas 1 700 kaj en Usono 2 000.

En la lastaj jaroj esplorado de tiu problemo rikoltis bonajn sukcesojn en- kaj eksterlande. La Ŝanhaja Biblioteko eldonis la gravajn verkojn pri ĉina genealogio "Studo pri la Ĉina Genealogio" kaj "Epitomo de la Genealogioj Konservataj en la Ŝanhaja Biblioteko". Marte de 2000 ekfunkciis la Reto por Serĉi Originon. La reto estas kune entreprenata de la Ŝanhaja Biblioteko kaj Singapuro. Ĝi estas la unika reto en la mondo tiukampe.

● En Kantono ĉinaj arkeologoj trovis ruĝon de reĝa palaco de Nanyue, kiu estis antikva reĝlando en suda Ĉinio kaj pereis en 111 a.K. La palaco estis imitaĵo de la imperiestra palaco de Han-

dinastio. Ĝi estas la unua reĝa palaco, ĝis nun malkovrita en Ĉinio. Tiu eltrovo montras, ke jam antaŭ 2 000 jaroj formiĝis la unuigita Han-kulturo.

● La 66-jara emerito s-ro Ji Zhiguang post 40-jara kolektado havas 1 500 000 alumetajn glumarkojn de 150 000 serioj faritaj de 120 landoj kaj regionoj.

La alumetaj glumarkoj montras historian evoluon, ekonomian disvolviĝon, popolajn morojn kaj geografiajn fizionomiojn de



Ji Zhiguang kaj la de li kolektitaj alumetaj glumarkoj

Ĉinio kaj aliaj landoj.

● La 18-20-an de oktobro en Nankino de Ĉinio okazos konferenco de la Monda Teknik-urba Asocio kaj Ekspozicio de Novaj kaj Altteknologiaj Fruktoj de Nankino. Tio estas la dua konferenco, kaj la unua okazis en Koreio en 1998. La ĉi-foja konferenca temo estas "Novaj kaj altteknologiaj industrioj en la 21-a jarcento".

● La ĉinaj sportistoj, sin preparantaj por la konkurso en la 27-aj Olimpiaj Ludoj, estas multe atentataj kaj subtenataj de diversaj ĉinaj organizoj. Iuj donis al ili monhelpon kaj aliaj donacis al ili por-sportajn necesaĵojn, bonajn manĝaĵojn aŭ trinkaĵojn. La fama kompanio Anli provizis ilin per supernutra manĝaĵo Nutrilite kaj donacis al ili 1.5 milionojn da janoj, kio ege kortuŝis ilin kaj kuraĝigis ilin por pli diligenta trejniĝo.



# Kongreso por lingvo kaj kulturo de paco

## — Pri la 85-a UK

de XU SENRONG

**L**A 85-a UK okazis en Tel-Avivo, la plej granda urbo de Israelo, de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto. La kongreso, kiun partoprenis 1 212 samideanoj el 61 landoj, daŭris 7 tagojn kun unutaga intertempo.

La kongresa temo estis “lingvo kaj kulturo de paco”, kiu respondas al la internacia jaro de kulturo de paco — tiel nomis UN la jaron 2000. En la fino de la 20-a jc. kaj ĉe la sojlo de la nova jarmilo la 85-a UK okazis en la lulilo de judoj (nia majstro L. L. Zamenhof ja estis judo), kio donis al la kongreso apartan signifon. Estas interesa hazardo: En 1986, kiam en Pekino okazis la 71-a UK, TEJO okazigis sian IJK en Israelo, kaj ĉi-jare, kiam la 85-a UK okazis en Israelo, IJK okazis en la ĉina urbo Hongkong.

Amaskomunikiloj de Israelo donis grandan atenton al nia UK. Radiostacioj, TV-stacioj kaj ĵurnaloj 18-foje raportis pri ĝi. Tio montris ankaŭ la grandan kapablon de la LKK-anoj. Ĉi tie mi iom pritraktos la Internacian Ĥoron. Antaŭ la kongreso okazis io neatendita: la organizanto de la ĥoro pro ia kaŭzo ne atingis la kongreslandon. Malgraŭ la malfacilo LKK perfekte aranĝis la vesperon en nur kelke da tagoj kaj akiris plenan sukceson. Ilia laboro ricevis unuvoĉan laŭdon de la kongresanoj.

La kongreso iris ĝuste laŭ la

kongresa temo. La mesaĝo de la ĝenerala direktoro de Unesko s-ro Koichiro Matsuura por la inaŭguro, la mesaĝo de la ĝenerala sekretario de UN kaj tiu de s-ro L. C. Zaleski-Zamenhof klare montras la esperon de la homaro pri paca kunekzistado kaj interkompreniĝo. Ili ĉiuj deziris, ke Esperanto, komuna lingvo de la homaro, ludu sian rolon en la interkompreniĝo kaj amikeco de la homaro. S-ro Kep Enderby, prezidanto de UEA, multe traktis la antikvan historion de la Meza Oriento. Li traktis ankaŭ la devenon kaj disvolviĝon de la naciaj konfliktoj en la Meza Oriento. Post tio li citis vortojn de L. L. Zamenhof pri la homaj egaleco kaj rajtoj. Fine li diris: “Krom atentigo al la lingva problemo, ni ĉiam kuraĝe strebu plibonigi internaciajn rilatojn, kaj la protektadon kaj respektadon de la homaj rajtoj, kies graveco tiom allogas la atenton de la aktuala mondo, kaj kiuj tiom ege gravas

en niaj statutaj celoj.”

La parolado de s-ro Kep Enderby montris la maltrankvilon de UEA pri la paca evoluo de la Meza Oriento. Jes, en Tel-Avivo dum 11 tagoj ni dufoje vidis, kiel policanoj forigis eksplodaĵojn. Kvankam ili ne estis veraj eksplodaĵoj, tamen tio klare montris la akran nacian konflikton.

Jam finiĝis la 85-a UK kaj la kongresanoj unuj post aliaj forlasis Tel-Avivon. Mi deziras, ke la amikeco de la esperantistoj kaj ilia deziro pri paco kaj homa egaleco restu ĉiam en Tel-Avivo, en Israelo, en ĉiuj arabaj landoj. Eble ĝuste en tio kuŝas la kaŭzo, kial nia UK okazis en Israelo.


### KARPATI KAJ ALIAJ HELPEMAJ SAMIDEANOJ

Antaŭ 8 jaroj mi partoprenis la Vienan Kongreson kaj poste ĉeestis neniun UK. Pro tio mi



Kongresanoj





- 1 Sur la podio
- 2 EPC-laboranto donacas sian revuon al vicprezidanto de la Israela Parlamento.
- 3 Renkontiĝo de veteranaj e-istoj
- 4 Kunsido de Azia Agado
- 5 S-ro Chen Yuan (meze) post la malfermo
- 6 EPC-redaktoro rekomendas "La Familio".
- 7 Ĉe EPC-giĉeto



konas nur malmulte da alilandaj esperantistoj, por ne paroli pri israelaj. S-ro Michael Karpati estas la unua esperantisto, kiun mi renkontis en la flughaveno de Tel-Avivo. Li, gastama kaj parolema, tuj plaĉis al mi kaj miaj ĉinaj kolegoj. Ni ŝuldas al li multajn dankojn pro liaj helpoj dum nia restado en Israelo. Dank' al li ni facile trovis tranoktejon. Li gastigis nin, ke ni povis koni la vivon de ordinara israelanoj. Ankaŭ lia edzino parolas Esperanton. Ŝi, gastama kaj entuziasma same kiel li, preparis por ni abundan vespermanĝon. Ĉe la tablo sidis ankaŭ ŝia patro. Pro la lingva baro ni povis fari nur gestojn. La maljunulo ne vivis kune kun ili. Eble pro nia gastado ili invitis ankaŭ la maljunulon. El tio ni vidis, ke ankaŭ judoj havas la moron respekti maljunulojn.

Ni renkontis multe da bonkoraj esperantistoj. Survoje al Tel-Avivo ni haltis en Vieno, kie ni devis ŝanĝi la aviadilon. Jam vesperiĝis, kiam ni atingis Vienon, tial tranoktado fariĝis aktuala problemo por ni. S-ro Klag mendis por ni hotelon, veturigis nin de la flughaveno al la hotelo kaj invitis nin vespermanĝi en restoracio. Post la vespermanĝo li akompanis nin rigardi la urbocentron de Vieno. En la inaŭguro ni renkontis s-ron Patek, kiu loĝas en urbo norde de Vieno. Li estas nia peranto jam dekojn da jaroj. Post la kongreso li atingis Vienon pli frue ol ni je duontago. Ĉar en la sekvanta posttagmezo ni devis flugi al Pekino, tial li hastis al ni frumatene per trajno kaj akompanis nin ekskursi en Vieno kaj fine akompanis nin al la flughaveno.

Mi devas diri, ke sen helpo de la fervoraj esperantistoj, ni certe renkontus pli da malfaciloj

en la vojaĝo.

## ĈINA MALJUNULO INTER LA KONGRESANOJ

Dum la kongreso oni ofte vidis figuron de ĉina maljunulo. Li parolis vigle kaj iris firmaŝe. Li estas 82-jara ĉina esperantisto Chen Yuan. Li estas membro de la Patrona Komitato de UEA. Li partoprenis la kongreson kiel ordinara samideano, tial li kategorie rifuzis sidlokon sur la podio. Li diris, ke li komencis sian karieron per Esperanto-movado kaj rigardis la ĉi-fojan Esperanto-renkontiĝon kiel sian lastan agon en sia kariero. Mi admiras lian kuraĝon. Li, grandaĝa, de-



En la hejmo de Karpati

cidis en la plej varmaj tagoj viziti la plej varman lokon de la mondo kaj per tio realigi sian deziron. Tio bezonas grandan kuraĝon.

## EPĈ-DELEGACIO EN LA KONGRESO

En la kongresejo ni havis giĉeton por eksponi la eldonaĵojn poŝte senditajn de nia redakcio, sed la poŝtaĵo ne atingis la lokon eĉ en la lasta tago de la kongreso. Feliĉe, ni kunportis malgrandan kvanton da EPĈ-ekzempleroj, poŝtmarkoj kaj bildlibroj. Ni do eksponis ilin. Nia giĉeto estis alloga. Multaj foliumis niajn revuon

kaj bildlibrojn. Inter la vizitantoj ne mankis fakuloj, kiuj montris sian admiron al la libroj eldonitaj de la Ĉina Esperanto-Eldonejo.

La kunsido de EPĈ-legantoj estas okazanta ĉiujare. Niaj legantoj el diversaj landoj kutime intervidiĝas en la kunsido kaj interŝanĝas opiniojn kun EPĈ-redaktoroj. Ĉi-foje ili donis grandan atenton al la estonteco de nia revuo kaj prezentis al ni bonajn ideojn.

La plej grava afero por ni en la ĉi-foja kongreso estis prezenti nian peticion al la estraro de UEA por gastigi la 89-an UK en Ĉinio en 2004. Informiĝinte pri nia peto, multaj samideanoj diris kun ĝojo, ke ili certe venos al Ĉinio, se nia peto plenumiĝos, kaj deziris al ni sukceson.

Ankaŭ "Libroj de la Jaro" estas interesa programero. Nemalmultaj kolegoj laŭdis, ke ni eldonis tiom da dikaj klasikaj verkoj en Esperanto. Ĉi-jare ni rekomendis al niaj legantoj "La Familio" verkita de Bakin. Tuj ĉe la finiĝo de la kunveno iu kroata samideano montris sian volon aĉeti tiun

romanon. Ĉar tiam ni ankoraŭ ne ricevis la poŝte senditajn eldonaĵojn, mi do donacis al ŝi mian propran libron, malgraŭ ke sur la libro mi faris multe da strekoj. Mi bedaŭras, ke mi ne povis kontentigi pli multajn per pli da libroj.

Finiĝis la 85-a UK, kaj ni jam revenis Pekinon. Revenis sian hejmlandon ankaŭ niaj alilandaj amikoj. Kion ili atendas? Ili deziras renkontiĝon en la venonta jaro kaj, pli grave, paciĝon de Israelo kun ĝiaj arabaj najbaroj, ke la popoloj en la Meza Oriento vivu pace kaj feliĉe, kaj ke paco kaj amikeco akompanu la tutan mondon por eterne. ■

# La deka konkurso de EPĈ-legado finita

de WANG HANPING

Doninte la demandojn de la deka konkurso de EPĈ-legado en la 11-a numero de 1999, ni ricevis leterojn de 65 legantoj el Pollando, Finnlando, Nepalo kaj aliaj 25 landoj.

La nombro estas multe pli granda ol la antaŭaj kaj la respondoj rimarkinde bonaj. Multaj konkursantoj ĝuste respondis ĉiujn demandojn. Ĉar la demandoj tuŝis diversajn temojn nelimititajn en la revuo, la konkursantoj havis pli grandan liberecon en respondado. Ni ĝoje trovis, ke multaj legantoj fariĝis grandaj konantoj de ĉinaj aferoj, leginte nian revuon.

Post lotado la unuagradan premion gajnis Hans-Burkhard Dietterle el Germanio, Magda Dybowska kaj Marta Leszyska el Pollando; la duagradan premion gajnis Nelkowski Artur, Jozef Kristian, G. O. Vaske, Vladimir Vyĉegjanin, Gambhir Man Shrestha, Popoviciu Ekaterina, Tomislav Mitroviĉ, Sanela Zakiĉ kaj Juoas Racijs; kaj la triagradan premion gajnis Shen Guangmeng, Krystyna Babian, Vladimir Hodin, Francisco Jurandir de Melo, Nguyen Quang, Anatolo Sidorov, Ĉmeljov Petro Nikitiĉ, Magdalena Byczkowska, L. Senĉisĉeva, Kazuira Borkowska, Irina Nagi, Hoang Thi Chinh, Antero Harju, Genevieve Maillart kaj Bjikjan Nina.

La ĝustaj respondoj de la konkurso legiĝas kiel jene: 1. En Diqing de Yunnan-provinco (p. 20, 6-a n-ro); 2. (laŭ propra opinio); 3. Hongkong,

Makao; 4. Maĝango (p. 38, 7-a n-ro); 5. Ĝing-voj (p. 42, 2-a n-ro); 6. Budhismo, taoismo, islamismo, kristanismo ktp. 7. La ĉina el ligno, la eŭropa el ŝtono (p. 24, 4-a n-ro); 8. Yarlung Zangbo (p. 28, 10-a n-ro); 9. 210 000 (p. 35, 8-a n-ro); 10. La 84-a UK, la 4-a Ĉina Kongreso de Esperanto kaj la 2-a Azia Kongreso de Esperanto.

La konkurso de EPĈ-legado jam havis 10-jaran historion. Kvankam ni promesis malgrandajn premiojn, tamen niaj legantoj ĉiujfoje aktive partoprenis. Multaj el ili eĉ partoprenis ĉiujn 10 konkursojn, tio estas tre laŭdinda, kaj dank' al ili ni ricevis multajn bonajn proponojn kaj informojn. Ĉi-foje ni elektis jenajn samideanojn kiel elstarajn partoprenintojn de la konkursoj: Clary Françoise, Erkki kaj Aira Rontynen, Caio Matos, Alice Amalia Klein, Aleksije Heriĉ, Farkas Antal, Irene Szucs, Suzanna Barabas, Nguyen Van Dien, Szentgyorgyi Zoltan, Odette Bernet, Rudi Izlakar, Horvat Ilona, Jurgen Berdt kaj Vasiljev Oleg Alekseeviĉ. Ni kore gratulas ilin kaj dankas ĉiujn aliajn partoprenintojn.

## Esperanta centro por infanoj fondita en Ĉinio

La 14-an de julio 2000 la Esperanta Centro por Infanoj, la unua en Ĉinio, fondiĝis en la Elementa Lernejo Hengxing en la urbo Yancheng, Jiangu-s-provinco. La ceremonion de ĝia fondiĝo ĉeestis estraranoj de la Jiangu-s-a E-Asocio, respondeculoj de koncernaj departementoj de la urbo, membroj de la konsilantaro de la Yancheng-a E-Asocio, instruistoj, lernantoj, ties gepatroj kaj s-ano Violette Walther el Francio.

La ceremonio komenciĝis per krakado de petardoj, gongado kaj tamburado. Prof. Zhou Benyou, prezidanto de la Jiangu-s-a E-Asocio, deklaris la fondiĝon de la centro kaj deprenis la tukon de sur la ŝildo de la centro. E-isto Li Wenxian, rektoro de la Elementa Lernejo Hengxing, dankis, je la nomo de la pli ol 700 instruistoj kaj lernantoj de la lernejo, amikojn kaj E-organizojn en- kaj eksterlandajn pro iliaj prizorgo kaj subteno al la starigo de la centro. Li diris, ke la lernejo penos konstrui Esperantan medion, kiel eble plej frue starigi la Jiangu-s-an Eksperimentan E-Lernejon surbaze de la centro kaj progresigi E-movadon. Lernantoj prezentis Esperantajn programerojn.

Post la ceremonio la ĉeestantoj vizitis la lernejon. Pri la lernejo, plena de Esperanta etoso, multe interesiĝis e-istoj el aliaj lokoj de Ĉinio, kiuj kunsidis kun instruistoj kaj lernantoj de la centro. Prof. Cui Jianhua, s-ano Violette Walther kaj s-ino Shi Xueqin donis konsilojn al la E-instruistoj de la centro pri E-instruado.

(Wu Meizhao)

# Plansetlejo en Pekino

Antaŭ 30 jaroj la laborantoj de la registaro faris nur disdonadon de porciaj kuponoj de greno, kuiroleo kaj aliaj manĝaĵoj. En la lastaj 20 jaroj ilia laboro pli kaj pli multiĝis: naskolimigo, registro de enmigrintoj...

de PANG NAIYING

**H**EPINGLI estas unu el la ordinaraj plansetlejoj en la orienta parto de Pekino. Ĝi kovras areon de 6.4 kvadrataj kilometroj kaj en ĝi vivas 100 mil pekinanoj kaj 16 mil enmigrintaj alilokanoj. Ĝi ne estas vasta, sed kvieta kaj bela. La loĝantoj diris: "Ĝi estas nia komforta hejmo."

## TUTKORE POR LA PLANSETLEJO

La koro de la maljunuloj en la maljunulejo de la plansetlejo estas plena de granda kontentiĝo. Ili ofte diris: "Ni ne havas infanon, sed ni ricevas donacojn en nia naskiĝtago. Antaŭvespere de la Printempa Festo, oni vizitas nin kaj regalias nin per bongustaĵoj..."

La maljunuloj ŝuldas siajn dankojn al s-ro Yu Junjie, gvidanto de la plansetlejo, kaj liaj kolegoj. En 1994, kiam li ĵus prenis la postenon, li faris reformadon al la laboroj de la plansetlejo. S-ro Yu diris al mi, ke plansetleja registaro estas la plej baza registara instanco en Ĉinio. Antaŭ 30 jaroj, pro malfacila situacio de ekonomio de la lando, la laboro de la plansetlejo estis malmulta, kaj la laborantoj de la registaro faris nur disdonadon de porciaj kuponoj de greno, kuiroleo kaj aliaj manĝaĵoj, kontrolon de la pureco en la plansetlejo kaj

propagandon pri sekureco. En la lastaj 20 jaroj, kune kun la progreso de la socio, la laboro de la plansetleja registaro pli kaj pli multiĝis: naskolimigo, registro de enmigrintoj, transloĝiĝo pro malkonstruo de kadukaj domoj, reenoficigo de senlaboriĝintoj, administrado de bazaro de agrikulturaj produktaĵoj, trafiko, sekureco, mediprotektado... Unuvorte, ĉiuj bagateloj fakte koncernas la tutan socion.

Por s-ro Yu Junjie, la 300 specoj de 20 kategorioj de la laboro de la plansetlejo ĉiuj estas malfacilaj. Sed la ŝlosilo por solvi tiujn problemojn estas "scii la loĝantojn". Se oni bone konsideras la malfacilajn cirkonstancojn de la loĝantoj kaj tutkore helpas ilin solvi problemojn, oni povas vizaĝi al ĉia malfacila laboro. Tial la grava laboro de Yu post lia enoficiĝo estas elimini burokratismon. Li ofte atentigas siajn subulojn: "Iuj aferoj ŝajnas bagatelaj por la registaro, sed povas esti tre gravaj por individuoj, kaj ni devas zorgi pri tiaj aferoj."

En la plansetlejo multaj familioj trafitaj de malfeliĉo akiris helpon de la laborantoj de la plansetleja registaro. La unua oficiojaĝo de Yu Junjie post lia enoficiĝo estis vizito al malliberuloj de lia plansetlejo. Kiam li informiĝis, ke la edzino de iu malliberulo rompis kun li la interrilatojn, li vizitis ŝin kaj admonis ŝin, ke la prizorgo de la socio kaj familio estas plej efika por purigi la animon de la malliberuloj. Li postulis ankaŭ, ke ĉiuj fakoj de la registaro laŭeble kreu kondiĉojn por helpi la malliberulojn transformiĝi en bonulojn. Ekzemple ili rezervis por liberigitaj standojn en bazaro de agrikulturaj produktaĵoj. Ĉi tiuj estas tre dankaj al la registaro kaj obeas al la leĝo kaj ne plu damaĝas la socion.

## HELPI SENLABORULOJN

En la pasintaj jaroj, kune kun profundiĝo de la reformado de ŝtataj entreprenoj, 5 226 homoj en la plansetlejo perdis okupon. La labordona sekcio de la plansetlejo promesis laŭeble helpi ilin reenoficiĝi. Bone sciante, ke doni laboron al tiom da homoj estas tre malfacile, ĝi petis helpon de la pli ol 500 unitoj en la plansetlejo, ke ili aŭ liveru informojn pri dungebleco, aŭ mem dingu homojn, aŭ donacu objektojn kaj monon, aŭ diskoniĝadu pere de vehikloj. Dank' al la komuna klopodado, ĝis la



Plansetlejo

fino de 1999, 85% de la senlaboruloj en la plansetlejo reakiris laboron.

La plansetlejo mem fondis butikon, kiu povas liveri laborŝancon al senlaboruloj kaj servi al ili je favoraj prezoj. Nun en la plansetlejo estas dekoj da tiaj butikoj.

Senlaborulino Lü Yaling havis filon lernantan en mezlernejo. Ŝia edzo enspezis malmulte, kaj la vivo falis en embarason. La plansetleja registaro do helpis ŝin starigi en la hejmo manĝejon por lernantoj, kies gepatroj ne havas tempon prepari por ili tagmanĝon. Tiamaniere ŝi havas certan enspezon. Poste ŝi prenis sur sin la laboron akompani lernantojn al la lernejo kaj prizorgi ilin post la lecionoj.

## NASKOLIMIGO

Dum longa tempo rapide kreskis la nombro de la loĝantaro de Ĉinio, kio katenis la progreson de la socia ekonomio kaj pezigis la vivon de la ĉinoj. Tia situacio kompreneble instigis la registaron praktiki naskolimigon kiel fundamentan politikon de la ŝtato. Kaj en la plansetleja registaro estas sekcio de naskolimigo.

Sur la muro de la sekcio estas ilustritaj tekstoj pri fiziologiaj kaj psikologiaj scioj de adoleskanteco ĝis klimaktero. Gejunuloj venintaj sin registri por geedziĝo povas rigardi filmon pri geedziĝa higieno kaj eŭgeniko, pruntepreni kelke da videobendoj pri seksologio aŭ akiri preventilojn. La ĉefo de la sekcio estas afabla kaj entuziasma sinjorino. Ŝi diris, ke antaŭe la naskolimiga laboro estis monotona, la maniero ŝablona kaj la labor-stilo rigida, sed fakte ĝi devus esti laboro plena de humaneco; oni devas akcenti ne nur la limigon de la nombro de la loĝantaro, sed ankaŭ la kvaliton de la homoj.

Naskolimigo al enmigrintoj estas tre malfacila, ĉar en tiu homamaso troviĝas multaj homoj



Laborantoj de la plansetlejo donas donacon al maljunulino en maljunulejo pro ŝia naskiĝtago.

malobservantaj naskolimigon. Antaŭe oni faris ĉefe monpunon, sed tio ne povis radikale solvi la problemon. Nun la gvidantoj de la plansetlejo decidis unue levi la civilizitecon de la homoj kaj fondis “lernejon por enmigrintoj”. Oni konigis al ili la situacion de la ŝtato kaj sciojn pri sanprotektado de gravedulinoj kaj beboj kaj disdonadis preventilojn kaj lernomaterialojn. Krome, oni ankaŭ donis “honoran akton” al la familioj, kiuj bone observis naskolimigon. Ili faris naskolimigon memkonscia agado.

## FARI LA LOKON PURA

Krei verdan vivmedion estas la plej granda deziro de la loĝantoj de la plansetlejo. Por tio la administrantoj de la plansetlejo kolektis monon pere de multaj kanaloj kaj konstruis gazonojn kaj floran promenejon. Ili klopodis por solvi la problemon de polucio de bruo kaj ellasita gaso kaj malpura akvo, instalas rubujojn klasifikitajn kaj lanĉis la mediprotektan aktivadon “adiaŭi plastajn sakojn kaj uzi tolan sakon” kaj instigis la loĝantojn bone trakti la terglobon, savi pereontajn vegetalojn kaj bestojn, elekti verdan vivon kaj partopreni en mediprotektado.

Al Pekino mankas akvo, kaj

la gvidantoj de la plansetlejo donis grandan atenton al tio. Antaŭ kelke da jaroj ili jam instruis la loĝantojn ŝpari akvon, disdonis akvoŝparajn aparatojn, resumis sperton kaj disvastigis ĝin tra la tuta plansetlejo... Dank’ al ilia zorgema kulturado, la loĝkvartalo Xiaohuangzhuang en la plansetlejo fariĝis la unua akvoŝpara kaj mediprotekta ekzemplo de Pekino.

Samtempe kun protektado de la natura medio, la urboadministratradaj kadroj de la plansetlejo neniom neklektas la ordigadon de la medio. Ekzemple en la lastaj jaroj, kune kun kreskado de la nombro de enmigrintoj, multiĝis ŝteloj en la plansetlejo. Kunlabore kun koncernaj departementoj, la kadroj de la plansetlejo faris al enmigrintoj prelegojn pri leĝo kaj vivrimedoj, instruis al ili sciojn kaj donis prizorgon al ilia vivo. Nun en la konstruejoj kadre de la plansetlejo regas bona ordo, kaj la barakoj de la enmigrintoj-konstruantoj estas puraj kaj bonordaj. Ili jam ne plu estas senorda homamaso. Iu ĉefo de la konstruantoj diris: “Ni migris multajn jarojn al multaj lokoj, kaj ni sentas, ke Hepingli estas nia hejmo, ĉar tie ne estas diskriminacio nek sinmalestimo, tial ni havas konscion pri nia devo.” ■



# Avino vizitas lernejon

Teksto de JIANG NANYI  
Fotoj de YANG XINYU

Tio estas komputika mezlernejo en la urbo Chongqing. En klasĉambro estas tre okulfrapa avino kun miopaj okulvitroj aŭskultanta atenteme.

Ŝi nomiĝas Dong Shiyun, avino de lernantino Wang Li, kiu pro elstariĝo de mjelomeningo perdis kapablon piediri. La avino maltrankviliĝis. Krom

zorgema flego al la nepino, ŝi decidis mem viziti la lernejon anstataŭ la nepino. Fine la avino venis al la lernejo kaj faris klarigon al la instruisto. Tiu emociiĝis pro ŝia agado kaj akceptis ŝian peton.

Ekde tiam la avino vizitas la lernejon kaj Wang Li lernas de la avino hejme. Ĉiutage survoje al la lernejo vidiĝas figuro de maljunulino kun sako plena de libroj kaj kajeroj surdorse.



Instruisto donas lecionon al Wang Li en ŝia hejmo.








La avino transdonas al la nepino, kion ŝi lernis de instruisto.



La avino rekompencita de la nepino per amo



La avino en klasĉambro



## SUBMARA ESPLORADO

La vigla Surmara Silka Vojo por komerco kaj navigacio en antikva Ĉinio jam malaperis en la blua maro. Tamen la ĉ. 3 000 ŝipoj kun varoj kaj la havenaj instalaĵoj dormantaj sub la maro registris ĝian iaman prosperon.

En la lastaj dek jaroj ĉinaj arkeologoj faris esploron kaj prifosadon en pli ol 10 lokoj.

La esplorado de la maro proksime de la gubernio Suizhong, Liaoning-provinco, komenciĝis en 1991. En multfoja submara esplorado oni elakvigis en ŝipoj de Yuan-dinastio (1206-1368) 1 000 porcelanaĵojn — bovloj, teleroj, vazoj, potoj k.s., inter kiuj estas altkvalitaj, kiel vazo kun bildoj de drako kaj fenikso kaj kun ludantaj knaboj. Tiuj porcelanaĵoj havas fonon de blanka glazuro kun nigraj desegnoj. Oni trovis ankaŭ multajn feraĵojn, plejparte sokojn jam rustiĝintajn. Pro tio, ke estas malfacile konservi ilin, la arkeologoj lasis ilin resti sub la maro.

La Suda Ĉina Maro estas grava por trafiko. En ĝi ĉe la insularoj Xisha kaj Nansha estas multaj rifoj el koraloj, pro kiuj

nekalkuleblaj komercaj ŝipoj dronis en la pasintaj jarcentoj.

En 1998 kaj 1999 arkeologoj faris esploron de loko ĉe la insularo Xisha, kie ŝipoj dronis. Ili rimarkis, ke la tiea marakvo estas tre klara kaj la submara mondo multkolora. Kiam ili forigis koralan tavolon 4 metrojn sub la marfundo, malkovriĝis blue kaj blanke glazuritaj porcelanaĵoj bonorde stakigitaj...

## URBOMURO DE NANKINO

Nankino estas konata kiel unu el la famaj antikvaj ĉefurboj de Ĉinio. Kelkaj feŭdaj imperiestroj faris ĝin sia ĉefurbo. Do la ruino de la urbomuro de

Nankino ne nur montras riĉan kulturon, sed ankaŭ estas parto de la vivo de nankinanoj. Pri la urbomuro oni diris, ke kiam vi



Purigado de historiaj objektoj elakvigitaj



Arkeologo kun historiaj objektoj prenitaj de sur la marfundo

pediras sur stratoj de Nankino, nerimarkite vi jam staras antaŭ parto de la urbomuro. En la lastaj jaroj Nankino kelkfoje organizis turismajn aktivadojn sur la urbomuro kaj nun komencis ripari la muron. Samtempe la urba registaro eklaboris por prezenti peton, ke oni enlistigu ĝin kiel unu el la Mondaj Kulturaj Heredaĵoj.

Multaj ĉinaj antikvaj urboj estis en formo de kvadrato aŭ rektangulo, tamen konsiderante, ke Nankino estas fortreso ĉe akvovojo, oni konstruis ĝin en Ming-dinastio (1368-1644) en formo de poligono. Tie la monto, rivero kaj urbo harmonie kunfandiĝis. Esploris kaj alte taksis la urbomuron la ĝenerala direktoro de Unesko en 1995. La urbomuro estis 33.67 km. longa kaj ĝia konstruado daŭris 21 jarojn en tiu dinastio.

Hodiaŭ la urbomuro restas 21.35 km. longa, kun 8 pordegoj. Kvankam en la pasintaj pli ol 600 jaroj pluvo kaj vento ĝin eroziis, tamen ĝi ankoraŭ majeste staras. Ĝia bazo estas granita kaj kalkoŝtona, kaj ĝiaj brikoj el bonkvalita argilo kaj blanka kaolino, kaj oni cementis ilin per mortero el kalko, kaĉo el glueca rizo kaj uruŝio. Ĝi altas 14-21 m., kun 131 616 kreneloj kaj 200 citaĉeloj.

Zhonghua-pordego, alinome Jubao-pordego, estas la plej fortika citadelo, kiu havas kvar ĉirkaŭmurojn unu post alia, kaj la interspaco inter du muroj estas nomata "urno-urbo", kie oni povis ĉirkaŭi la malamikojn kaj facile ekstermi ilin.

Nun la magistrato malpermesas konstrui domojn ambaŭflanke de la urbomuro, transloĝigas la loĝantojn kaj faras gazonon 8-15

m. larĝan. Ĝi planas konstrui novajn ĝardenojn ĉe la urbomuro kaj samtempe rekonstrui la malnovajn kaj plibonigi la medion.

## LA VILAĜO QINGLINSI

La nomita vilaĝo estas apud Yangzi-rivero. Antaŭ unu jaro ĝi eldonis sian unuan enigmo-kolekton.

Se vi renkontas vilaĝanon sur montodeklivo, ĉe rivero aŭ en kampo kaj mencias enigmodivenadon, li certe parolas pri ĝi interesoplene.

Yang Shiquan, 52-jara, estas malmulte klerigita, tamen povas elbuŝigi pli ol 500 enigmojn. Li estas lerta en enigmofarado. Liaj enigmoj estas el samnombraj vortoj, kun ritmoj. La solvo estas objekto de la ĉiutaga vivo.

En la vilaĝo Li Xu'an kaj lia edzino ŝuldas sian geedzecon al

enigmodivenado. Kiam ili ne geedziĝis, multaj svatis ŝin pro ŝia beleco. Do ŝiaj gepatroj decidis elekti bofilon per enigmodivenado. Ili starigis enigmon al ĉiuj, kiuj petis la manon de ilia filino. Fine Li Xu'an solvis la enigmon kaj fariĝis ilia bofilo.

Enigmojn de Qinglinsi karakterizas la lokaj koloroj. Enigmoj kaj solvoj riĉas je enhavo kaj rilatas al lokaj naturo, klimato, moro, vivo kaj ĉiutagaj uzaĵoj.

La Qinglinsi-anoj tiel amas enigmodivenadon, ke el ĝi devenis kelkaj lokaj moroj, ekz. kiam renkontiĝas survoje du nuptaj procesioj, ili faras konkurson pri enigmodivenado, kaj la venkito devas cedi la vojon al la venkinto. La vilaĝo okazigas enigmodivenan konkurson ĉiujare, kaj ĉe la diversaj ceremonioj enigmodivenado estas nemankigebla amuza programero.



Enigmodivenado dum laborpaŭzo

# Kial geedza paro havas nur unu infanon?

Mi interesiĝas pri vivmaniero de ĉinoj, speciale pri politiko de solfilo en Ĉinio.

Morita Yoko (Japanio)

En Ĉinio validas ordono, laŭ kiu ĉiu familio povas havi (naski) nur du infanojn (fakte nur unu — La Trad.). Ĉu oni tion plenumadas? Kiel oni punas eventualan malobeon? En kiu kazo estas ebla escepto?

Miloslav Svab (Ĉeĥio)

de XIANG HONG

**T**RO da loĝantoj multe ŝarĝas la nacian ekonomion kaj ĉiutagan vivon, kion bone konas multe da ĉinoj, pre-

cipe tiuj, kiuj loĝas en grandaj urboj. Jen ekzemplo: Ekde la pasinta jaro, pro la Nacia Tago, Printempa Festo kaj 1-a de Majo la ĉinoj povas ĝui 7-tagan feriadon, sekve de tio multe pliiĝas turistoj en la festotagoj. Tamen, kiam ili vojaĝas aliloken kun granda ĝojo, ili renkontas la saman problemon: preskaŭ ĉiuj vojoj estas ŝtopitaj de trafikiloj, ĉiuj turismaj lokoj estas plenplenaj de homoj. En ordinaraj tagoj la ĉinoj jam al kutimiĝis al interpuŝiĝado en aŭtobusoj kaj longa vico da atendantoj en hospitaloj kaj poŝtoŝtancoj. Tiaokaze oni nur veas: "Ni povas fari nenion. En Ĉinio estas tro multe da homoj."

En 1999 Ĉinio havis 1.26 miliardojn da loĝantoj, pro kio oni devis danki la politikon pri naskolimigo, ekpraktikatan en la 70-aj jaroj. Sen praktiki tiun politikon en la pasintaj 30 jaroj Ĉinio havis ĉ. 1.6 miliardojn da loĝantoj. Fakuloj asertis, ke la 1.6 miliardoj da loĝantoj estas maksimumo tolerebla por la riĉfon-

toj de Ĉinio. Oni povas diri, ke Ĉinio finis la transiron de multa naskado, malmulta morto kaj granda kresko de la loĝantoj al malmulta naskado, malmulta morto kaj malgranda kresko de



Ĉina familio antaŭ 1949

la loĝantoj. Kompreneble, oni atribuis tion al disvolviĝo de ekonomio kaj leviĝo de eduka nivelo, sed la decidan rolon ludis la politiko pri naskolimigo "malfrua geedziĝo, malfrua nasko kaj havo de nur unu infano". Tamen praktikado de la politiko renkontis grandan malhelpon, ĉar en la pasintaj 2 000 jaroj ĉinoj preferis multan naskon.

## KIAM EKIS EKSPANSIO DE LA LOĜANTARO EN ĈINIO?

En Ĉinio la feŭda socio daŭris pli ol 2 000 jarojn, kiam ĉiuj su-

verenoj kuraĝigis naskon kaj pro tio la koncepto pri multa nasko kaj prefero de viroj firme enradikiĝis en Ĉinio. En Qing-dinastio (1644-1911), pro praktikaĵo de favora politiko pri nasko, la loĝantoj de Ĉinio kreskis de 100 milionoj al 400 milionoj en la 260 jaroj de ĝia regado.

En la sekvaj 38 jaroj, kiam Ĉinio troviĝis en milita kaoso, la registaro prenis la politikon de nelimigita nasko, tial en tiu periodo la ĉina loĝantaro pliiĝis je 140 milionoj. Se ne estus militoj, la loĝantaro multe superus tiun nombron.

En 1949-1953 ankaŭ la nova Ĉinio alprenis politikon kuraĝigi naskon, kaj tiam iagrade pliboniĝis la vivkondiĉoj de la ĉinoj kaj leviĝis la kuraca nivelo, sekve la loĝantaro daŭre kreskis. Komence de la 50-aj jaroj prof. Ma Yinchu, rektoro de la Pekina Universitato kaj fama ekonomikisto, rimarkis la malutilon de la tro rapida kresko de la loĝantoj al la socio en la estonteco kaj proponis limigi kreskon de la loĝantoj. Sed pro diversaj kaŭzoj lia tezo pri loĝantoj kaj propono pri naskolimigo ne estis akceptita. Nur en 1970 la naskolimigo ekpopulariĝis tra la tuta lando.

Tamen por la ĉinoj, kiuj havis firman koncepton “daŭrigo de familio per filoj kaj ju pli da filoj, des pli da feliĉo” kaj precipe por la kamparanoj, kiuj konsistigas 80% de la ĉina loĝantaro, la propono rikoltis nur malgrandan efikon, tial en la aŭtuno de 1980, kiam la ĉina loĝantaro superis 900 milionojn, la ĉina registaro fine ellaboris la politikon pri naskolimigo kaj elmetis la sloganon “limigi la nombron de la loĝantoj kaj levi la homan kvaliton”. La registaro difinis la minimuman aĝon por geedziĝo kaj dekretis, ke ĉiu geedza paro rajtas havi nur unu infanon. Kaj samtempe ĝi difinis, en kiaj okazoj oni rajtas fari la duafojan naskon kaj kiajn privilegiojn havas nacimalplimulto kaj kamparanoj.

## KIAL ONI RAJTAS HAVI NUR UNU INFANON?

Nun la lando suferas de vojŝtopiĝo, troloĝateco, media polucio kaj senlaboreco. Tiuj malfaciloj jam bone konigis al la homoj, kiajn malutilojn havas tro multe da loĝantoj. Sed antaŭ 20 jaroj la konfliktoj inter loĝantoj kaj ekonomio kaj inter medio kaj riĉfontoj ne estis tiel akraj kiel hodiaŭ, tiam la ĉinoj tre malfacile povis kompreni, kia rilato estas inter la nombro de la loĝantoj kaj daŭra kresko de la ekonomio, kaj ili ne volontis havi nur unu infanon. Ili pensis: Ĉu ne estas pli bone havi pli da homoj?

Tiam oficistoj pri naskolimigo ĉe diversaj niveloj de registaraj organizoj ne estis ŝatataj kaj en la kamparo iuj eĉ riproĉitaj. Ili devis elteni tion, foje refoje viziti vilaĝanojn kaj ĉiamaniere persvadi ilin ne plu fari la duafojan naskon. Multaj el la oficistoj, kiuj sin okupis pri tiu laboro, ankoraŭ bone memoras tiujn tagojn. Kiel malfacila estis tiam la

laboro!

Laŭ la politiko la solinfanoj ricevas subvencion ĉiumonate ĝis sia 14-jariĝo kaj antaŭ nelonge oni longigis la tempodaŭron ĝis 18-jariĝo. Kiu malobservas la politikon, estas monpunata, kaj la monpunoj estas diferencaj en malsamaj lokoj. Tiam, kiam Ĉinio komencis praktiki naskolimigon, reformadon kaj pordmalfermon, monpuno estis tre grava por la ĉinoj, kiuj estis neriĉaj siatempe.

Malgraŭ tio multaj ĉinoj asociis praktikadon de naskolimigo kun la nacia potenciĝo kaj multe da geedzoj volonte akceptis la politikon havi nur unu infanon. Kun la socia evoluo kaj konkurenca intensiĝo oni deziras pli kaj pli altan vivnivelon, kaj pli kaj pli da familioj deziras nur unu aŭ eĉ neniun infanon. La Orienta Distrikto de Pekino jam en 1993



Ĉina familio post 1980

realigis la negativan kreskon de la loĝantaro.

Ĝenerale Ĉinio jam eniris en la periodon de malmulta nasko, malmulta morto kaj malgranda kresko de la loĝantoj, tamen la tro multe da loĝantoj daŭre restas la ĉefa faktoro malhelpi la ekonomian disvolviĝon kaj plie la diferenco inter la urboj kaj kamparo estas tre granda. La normoj de ĉinaj kamparanoj nun estas tiom altaj, kiom tiuj de la urbanoj antaŭ 20 jaroj. Tio decidis, ke en la estonteco Ĉinio devos daŭre doni grandan aten-

ton al la kamparo por praktiki la politikon “limigi la nombron de la loĝantoj kaj levi la homan kvaliton”.

Oni diris al mi, ke post nelonge publikiĝos leĝo de Ĉinio pri loĝantoj kaj naskolimigo. ■

## Apendico:

En Pekino nur jenaj geedzoj rajtas havi duafojan naskon:

□ Ili havas nur unu infanon, kiu tamen estas handikapulo sen heredaj faktoroj laŭ diagnozo de medicina establaĵo kaj ne povas esti normala laborulo.

□ La edzo kaj edzino ambaŭ estas solinfanoj kaj ili havas nur unu infanon.

□ 5 jarojn post la geedziĝo la edzino ne gravediĝis, kaj medicina establaĵo post diagnozo konstatis, ke ŝi estas nenaskipova, sekve la geedzoj laŭ leĝo adoptis infanon, sed poste ŝi gravediĝis.

□ La regeedziĝinta paro havas nur unu duonfilon aŭ duonfilinon.

□ La nacimalplimultaj oficistoj, kiuj devenis de landlima regiono, estis permesataj de la loka naskolimiga instanco de la gubernia aŭ pli alta nivelo je la duafoja nasko kaj la edzino jam gravediĝis antaŭ ilia transposteniĝo.

□ El la du aŭ pli ol du kamparanaj fratoj nur unu frato kaj lia edzino estas naskipovaj kaj jam naskis

unu infanon, dum la aliaj fratoj ne adoptis infanon.

□ Juna kamparano fiksloĝiĝis en la bogepatra domo, kie mankas filo sed estas pluraj filinoj, kaj li devas vivteni la bogepatrojn, tiaokaze nur unu el iliaj filinoj rajtas fari la duafojan naskon.

□ En la malproksima antaŭurbo edzo aŭ edzino estis armeano je duagrada kripleco (B aŭ pli) aŭ unu el ili kripliĝis kaj perdis laborkapablon.

□ En profunda montaro kamparana geedza paro havas nur unu filinon, kun malfaciloj en la vivo.

# Majstra traduko de majstra romano

de KURISU KEI (Japanio)

LA FAMILIO: Verkita de Bakin, elĉinigita de Wei Yida, polurita de Li Shijun, eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1999. 14.8 x 21cm. 572 p. Prezo: 22.00 USD. Sendokosto: 5.00 USD.

Finfine aperis la Esperanta traduko de la romano "La Familio" unu el la ĉefverkoj de Bakin! Finfine, ĉar mi sciis, ke li verkis sian antaŭparolon por ĝi jam en 1982 en sia eseo "Unu Antaŭparolo", laŭvice la 94-a el sia esearo "Laŭokazaj pensoj" ( mi mem tradukus tiel anstataŭ "Kapricaj Pensoj" ), kiun mi siatempe legis en la japana traduko samkiel ĉiujn ceterajn, entute 90. De tiam mi miradis, kial ĝi tamen tiel longe ne aperas. Sed jen mi ĝin havas finfine en miaj manoj en bonega Esperanta traduko, sendube dank' al zorga polurado de Li Shijun. Sekve fino bona, ĉio bona!

Mi do elkore gratulas tion, unue al Bakin, la aŭtoro, kiu certe sopire atendadis tion, poste al Wei Yida, kiu iniciatis la tradukadon, al Li Shijun, kiu tiel majstre poluris ĝin, al la Ĉina Esperanto-Eldonejo, kiu ĝin eldonis, al la ĉina Esperantujo kaj fine sed ne malplej grave al la tutmonda Esperantujo, kiu fine povis aldoni ĝin al sia trezorejo, por fiere montri per nerefutebla fakto al la same tutmonda neesperantista publiko, ke Esperanto vivas kaj daŭre vivos longe malgraŭ ne nur defetisma sed eĉ senbatale-kapitulacisma libreto "Ĉu Esperanto postvivos la jaron 2045?" de Tazio Carlevaro.

Mi mem antaŭlonge konis ĉi tiun romanon laŭ la japana traduko

aperinta jam en 1956 en prestiĝa poŝlibretaro Iwanami, sed por honeste diri, se imiti la dirmanieron en la Esperanta traduko, ĉi foje mi tralegis ĝin kun pli granda kortuŝiteco kaj emocio. Mi ne scias precize, kial. Sed mi opinias ĉiukaze, ke ankaŭ tio pruvas, ke tamen vivas Esperanto!

La aŭtoro vive rakontas en ĉi tiu romano pri riĉa familio Gao en Chengdu, la ĉefurbo de Sichuan-provinco, sudokcidenta Ĉinio, ne longe post la Movado de la 4-a de Majo okazinta en 1919 en Pekino, kiu laŭ la trafa piednoto en la libro estis: "Kontraŭimperiisma kaj kontraŭfeŭdisma revolucio, kaj ankaŭ nova kultura movado kun demokratio kaj scienco kiel sia standardo".

La kvar generacioj de la familio Gao vivas sub la sama tegmento, kiel multaj ĉinaj familioj tiutempaj. La avo estas la patriarko, al kiu ĉiuj obeas senkondiĉe laŭ la malnova tradicio, eĉ la plej aĝa el la tria generacio, liaj nepoj, Juexin, sed liaj du plijunaj fratoj ne plu, precipe Juehui, la plej juna. Ĉi tiu ribelas rekte kontraŭ la malnova tradicio, tiel ke li fine forlasas sian familion kaj forveturas al Ŝanhajo por serĉi novan vivon, tamen post ĉio finance helpate de Juexin. Ĉi tiu do estas kiel tia persono sufiĉe komplika.

Juexin amis sian kuzinon Mei, sed li devis rezigni la edziĝon al ŝi kaj edziĝi al Ruijue, junulino el alia riĉa familio. Feliĉe montriĝis, ke ĉi tiu estas tiel ĝentila kaj kompatema, ke li eĉ ekamas ŝin. Ŝajnis, ke li estas feliĉa, sed nur ŝajne, ĉar li devis rezigni kontraŭvole ankaŭ plu studi kaj

krome devis ofici en firmao de la urbo. Plue lin doloris la sorto de Mei, kiu ankaŭ devis kontraŭvole edziniĝi al alia viro, kiu temen mortis pro malsano, des pli, ke ili ankoraŭ nun kaŝe amas unu la alian.

Mei malsaniĝas je ftizo pro malespero kaj mortas je granda lamento de Juexin. Sed jen mizerro sur mizerro, lia edzino, kiu gravediĝis je la dua infano, devis forlasi la hejmon kaj transloĝiĝi en humidan kaj malhelan loĝejon trans la rivero pro la kromvirino de la avo post ties morto, kiu laŭ superstiĉo insistis, ke alie la Grandsinjoro, la avo, ne povas trankvile dormi en la transa mondo, kaj rezulte malfeliĉe mortas ĉe akuŝo lasinte post si novnaskiton.


Juehui, la tria el la tri fratoj, amis Mingfeng, belan kaj ĝentilan servistinon en la familio, kaj estis preta edziniĝi ŝin spite nepran kontraŭstaron de la avo kaj la aliaj, sed ŝi instinkte antaŭvidis ĝian neblon. Kaj efektive kiam ŝi estis devigata de la Grandsinjoro fariĝi konkubino de laŭdire ekstravaganca, verŝajne perversa, maljunulo Feng Leshan, ŝi serĉis helpon ĉe Juehui, sed ĉar li ne emis aŭskulti ŝian petegon simple pro tio, ke ĝuste tiam li estis ege okupita per redaktado de la gazeto, kiun li fondis en la urbo kun siaj kamaradoj, kaj per verkado por ĝi, ŝi pro malesperiĝo sin ĵetis en la laĝeton en ĝardeno de la granda domo de la familio, je eterna kaj vana lamentado de Juehui. Li akre riproĉis sin: mi estas ŝia murdinto, kaj sian familion kaj la socion: ankaŭ ili estas ŝiaj murdintoj!

La plej feliĉa ŝajnis Juemin, la dua el la tri fratoj, ĉar li amis sian kuzinon Qin, kiu estas junulino progresema kaj studema, kaj al kiu li instruas la anglan. Ili jam ĵuris unu al la alia, ke ili geedziĝu spite al ĉio, sed post nelonge ankaŭ lian feliĉon minacas la ĉiopova volo de la avo, ĉar ĉi tiu akceptis la proponon de tiu abomeninda maljunulo Feng Leshan, ke Juemin edzinigu filinon de lia nevo. Kion fari? Sed Juemin ne estas Juexin, la obeema plejaĝa frato. Li kategorie rifuzas la proponon de Feng kaj la ordonon de sia avo kaj sin kaŝas for de la familio helpate de amiko. Kaj lian sekretan loĝlokon scias el la tuta familio nur Juehui, kiu ĝin neniel malkaŝas.

Tamen fine la ĉiopova avo malsaniĝis kaj kun tio lia koro moliĝis, tiel ke li diris al Juehui, ke li pardonu Juemin, kaj petas revenigi ĉi tiun hejmen, ĉar li sopiras ĉi tiun revidi. Juehui rapidas alporti ĉi tiun ĝojigan novaĵon al Juemin kaj ili kune hastas hejmen, sed ho ve, jam tro malfrue, ĉar la avo estis jam mortanta.

Kiam Bakin verkis ĉi tiun romanon, li estis nur 27-jara, sed kiom mi juĝas laŭ ĝi, li estis jam matura kiel verkisto. Kaj nun li estas verkisto bone konata ne nur en Ĉinio sed ankaŭ tutmonde. Ni esperantistoj povas fieri, ke ni havas lin kiel samideanon intern. Ni do legu ankaŭ liajn du verkojn "Frosta Nokto" kaj "Aŭtuno en la Printempo", ambaŭ esperantigitajn de Li Shijun, sed precipe la ĵus aperintan "La Familio" kaj ni ĝin ne nur legu, sed ankaŭ montru al niaj neesperantistaj amikoj kaj konatoj, ĉar ĝi estas bonega ekzemplo por pruvi, ke Esperanto estas vere vivanta lingvo tute taŭga ankaŭ por beletra esprimado. En tiu senco la Esperanta traduko de "La Familio" estas nova kaj potenca batalilo en niaj manoj.

Do aĉetu, legu kaj studu ĝin des pli, ke en ĝi troviĝas multe da utilaj kaj spicaj esprimoj, tuj



uzeblaj en konversacio, korespondado, verkado kaj tradukado. Ekzemple: por honeste diri (paroli), havi pikan langon; gardu vian langon! ĉirkaŭfrazu paroli; pagi sian porcion; havi sian mensan dilemon; vojhakanta pioniro; esti sufoke varmege; fari sian plejebulon; se mi estus en via pozicio; stupore stari; katpaŝe iri; ĉionspite lukti; elverŝi sian koron; gurdita frazo; elnodiĝo (en senco: solviĝo); tondro el serena (blua) ĉielo; atendu kaj vidu; elpremi kotizon; en palpebrumo...

La Esperanta traduko de "La Familio" estas vere majstra, preskaŭ perfekta. Kial preskaŭ? Ĉar en la mondo nenio estas absolute perfekta. Eĉ la suno havas siajn makuletojn. Kiom mi juĝas, ankaŭ en la Esperanta traduko de "La Familio" troviĝas pluraj

neglataĵoj. Ekzemple aperas jen pinaro jen pinarbaro; estu ĉiam pinaro. Aperas ankaŭ jen moskitvualo jen kulvualo; estu ĉiam moskitvualo, ĉar kiom mi memoras en la romano aperas nur moskito, neniam kulo. Kiom mi scias, la Printempa Festo en Ĉinio estas la lunkalendaro Novjara Festo. Do necesus piednoti ankaŭ pri tio. Kaj ĉu ne necesus piednoti ankaŭ pri "Trezorinsulo"? Ĉar eble ne ĉiu leganto scias, ke temas pri la fama romano de la brita verkisto R. L. Stevenson. La formo "vi devas trinki vinon la unua" estas ĝusta, sed kiom mi memoras en la komenco de la romano "la" ne uziĝas.

Sed tiaj neglataĵoj estas nur maloftaj, tiel ke ili estas kvazaŭ makuletoj sur la brilega suno kaj tute ne ĝenas la legadon. ■

# Muzikantaj ŝtonoj

En la postaj 8 jaroj Yang serĉadis sur sennombraj montoj en la suda parto de sia provinco. Li frapis preskaŭ ĉiujn viditajn ŝtonojn. Lia penado estis rekompencita per ĝojiga trovo: li trovis longe deziratan ŝtonon apud tombo de Ming-dinastio (1368-1644).

de YU ZIYAN kaj DONG SHULIN

**E**N la nuna han-nacia lingvo iuj ideogramoj havas la difinon por antikvaĵoj jam netroveblaj en la nuna tempo, ekzemple *ĉing-o* 磬. *Ĉing-o* estis antikva muzikilo farita el ŝtono aŭ jado, pendigita sur framoj kaj agrable sonanta je frapado. La ideogramo 磬 konsistas el du partoj: la supra parto 般 signifas sonon, voĉon, muzikon ktp., kaj la malsupra parto 石 — ŝtonon. Antikva libro notis, ke en Shang-dinastio (17-11-a jc. a.K.) oni jam ludis kiel muzikilon unuopan *ĉing-on* aŭ *ĉing-tri-opan*. En Zhou-dinastio (11-a jc. a.K. — 256 a.K.) *ĉing-o* konsistis el dekelke da pecoj. La plej malnova poemo-kolekto de Ĉinio

“Libro de Odoj” enhavas la versojn “Kaj pacon kaj akordon ni aŭdu de *ĉing-o*”. Bedaŭrinde la nuntempuloj ne povas aŭdi la “pacan kaj akordan sonon”, ĉar la muzikilo jam malaperis antaŭ tre tre longa tempo. Sed estas homo absorbiĝinta en la ĉina folkloro muziko, kiu deinfance kredas la onidiron pri “muzikanta ŝtono”. Li dediĉis multan tempon al esploro pri ŝtonaj muzikiloj kaj rikoltis sukceson. Lia nomo estas Yang Junzi.

La hejmloko de Yang estas Tengzhou en Shandong-provinco. Li naskiĝis en 1942. En la

infaneco li aŭdis de sia patro, muzika instruisto, pri muzikanta ŝtono. Foje la patro trovis sur montosupro grandan ŝtonon, kiu donis metalan sonon je frapo. Li tre volis porti ĝin hejmen, sed ĝi estis nemovebla pro granda pezo. Li rompis ĝin, sed ĝiaj fragmentoj ne donis plu agrablan sonon.



Yang Junzi ludanta ŝtonan muzikilon

Dum dekoj da jaroj li bedaŭris pro tio. La rakonto profunde radikiĝis en la koro de Yang Junzi. Li kredis la ekziston de muzikanta ŝtono, sed trovi ĝin estas malfacile. Poste li diplomiĝis el la arta fakultato de normala instituto kaj fariĝis muzika instruisto kiel la patro.

## RESONO EL PRATEMPO

En 1978 oni trovis subtere en Tengzhou ŝtonan muzikilon grupa *ĉing-o* faritan antaŭ 2 400 jaroj. Ĝi konsistas el 13 ŝtonaj pecoj, sed 2 el ili jam rompiĝis. Kiam la

muzikilo estis eksponata en la muzeo de Tengzhou, Yang Junzi pririgardis ĝin en tri sinsekvaj tagoj. Li unufoje vidis la muzikantan ŝtonon kiel en onidiro kaj aŭdis sonon kiel el pratempo. Yang estis ekster si de ĝojo. Li decidis serĉi taŭgan ŝtonon por anstataŭigi la du rompiĝintajn

pecojn. Analizinte notojn en antikvaj libroj, li kredis, ke plejeble tia ŝtono ekzistas tuj en sia provinco Shandong.

En la postaj 8 jaroj Yang serĉadis sur sennombraj montoj en la suda parto de sia provinco. Li frapis preskaŭ ĉiujn viditajn ŝtonojn. Lia penado estis rekompencita per ĝojiga trovo: en iu aprila tago de 1986 li trovis longe desi-

ratan ŝtonon apud tombo de Ming-dinastio (1368-1644).

Sed ĝi estis nur kruda materialo, kaj por fari ĝin muzikilo, li devis multe peni. Li fosis en amaso da antikvaj libroj. Por reprodukti antikvan muzikilon, oni bezonas ne sole sciojn de muzika teorio, sed ankaŭ tiujn de matematiko, fiziko, geografio, akustiko k.a. Do Yang komencis studon de novaj fakoj. Unue li esploris multajn ĉinajn naciajn muzikilojn, kiel ekzemple liuto, fluto, bivo k.s., kaj trovis la leĝon de vibrado de aero en la muzikiloj. Poste li esploris vibradon de kordo, plato





Yang Junzi kaj la de li faritaj ŝtonaj muzikiloj

kaj membrano kaj fine venis al kono pri la interrilitoj de ŝanĝiĝo de fizikaj kvantoj de longo, diko, proporcio, frekvenco kaj sonrapido de muzikanta ŝtono kaj resumis kalkulan formulon por farado de grupa *ĉing-o*. En 1987 li elfaris sian unuan reproduktaĵon de la antikva grupa *ĉing-o*. Melodio ĝuebla en palaco antaŭ pli ol 2 000 jaroj resonis en la nuna tempo.

## LA UNUA ŜTONA HARMONIKO DE ĈINIO

La sukcesa reproduktado de grupa *ĉing-o* multe ekscitis muzikistojn, sed oni rimarkis ankaŭ mankon de la muzikilo. Foje en landa simpozio de muzika historio multaj fakuloj diris al Yang Junzi, ke la sono de la grupa *ĉing-o* estas tre agrabla, sed ĝia pezo terura. Kiel bone estos, se oni elfaros ŝtonan harmonikon ne tiom pezan kaj facile porteblan.

La vortoj de fakuloj inspiris Yang Junzi, kaj li opiniis, ke la ideo fari ŝtonan harmonikon surbaze de grupa *ĉing-o* estas efektivebla. Profesoro Chen Lingqun de la Ŝanhaja Konservatorio opiniis, ke ŝtona harmoniko eble povos ludi la rolon de okci-

denta muzikilo ksilofono. La sono de grupa *ĉing-o* estas modera kaj harmonia al la aliaj muzikiloj en orkestro. Cetero la sono de *ĉing-o* ne povas esti influata de temperaturo kaj humideco kaj estas penetriva, sekve ĝi povas ludi korifean rolon en orkestro. En antikva libro estas diro, ke "sono de *ĉing-o* korifeas en la orkestro". Elfaro de ŝtona harmoniko estos senprecedenca kreo en la muzika historio.

Yang Junzi komencis faradon de ŝtona harmoniko. En decembro 1993 li elfaris sian unuan ŝtonan harmonikon. Ĝi estas la unua ankaŭ en la muzika historio de Ĉinio, kaj li ricevis patenton.

La ŝtona harmoniko de Yang Junzi karakteriziĝas per kromata gamo de 12-ona egala temperado, kun 48 tonoj en 4 oktavo. Ĝis nun dekelke da ŝtataj muzikaj lernejoj kaj societoj importis lian ŝtonan harmonikon. Jarfine de 1999 surbendigita muziko de ŝtona harmoniko estis programero en la konkurso de la Ŝanhaja Internacia Muzika Festivalo.

La deziro de Yang Junzi estas, ke pli multaj homoj de la mondo ĝuu la magian kaj originalan sonon de *ĉing-o* kaj lia ŝtona harmoniko. ■

## La 4-a Kongreso de Kroataj Esperantistoj fermita

La 4-a Kongreso de Kroataj Esperantistoj okazis sukcese en Djurdjevac. Tiutage en la medio kolektiĝis preskaŭ 200 esperantistoj el ĉiuj partoj de Kroatio kaj krome la gastoj el Bosnio kaj Hercegovino, Hungario, Italio kaj Slovenio. Abunda kongresa programo apenaŭ sukcesis esti metita en la programliston de la kongreso. Tamen ĉiuj programeroj okazis senprokraste kaj akurate, kun multaj partoprenantoj. Krom loka radio-stacio, pri la kongreso raportis Kroata Televido en du mallongaj raportoj kaj unu pli ampleksa raporto en sia matena programo la 31-an de majo. Lige al la kongreso eldoniĝis plenkolora urba prospekto (eldonis ĝin Esperantoklubo "Koko", p.p. 96, HR-48350 Djurdjevac, Kroatio), kaj maksimuma karto eldonita de Filatelista Societo en Virje. Samtempe la loka poŝtofocejo uzis specialan porokazan stampon. Ĉiuj eldonaĵoj ligitaj al la 4-a Kongreso de Kroataj esperantistoj estas haveblaj ĉe la Esperantoklubo "Koko". Eblas mendi ankaŭ videobendon.

**Josip Pleadin**

# Saniga gimnastiko de Shen Junru (II)

de YANG SHENG

IX. Froto de la tempioj. Forte frotu la tempiojn per la du dikfingroj. Unue, frotu ilin de ekstere internen kelkajn fojojn kaj post tio faru la samon inverse la samajn fojojn (Bildo 13).



13

X. Froto de la verto. Frotu rondire la verton per la maldekstra manplato kelkajn fojojn kaj poste faru la samon per la dekstra la samajn fojojn (Bildo 14 kaj 15).



14



15

Se vi havas longan hararon, premu per la du manoj la hararon kaj puŝu la manojn de antaŭe malantaŭen. Ripetu tion kelkajn fojojn.

XI. Froto de la vangoj. Premu per la du manoj la vangojn kaj forte frotu per la montra, meza kaj ringa fingroj la vangojn de la fruntalo malsupren (Bildo 16).



16


Kaj post tio frotu la vangojn de la tempiaj haroj malsupren (Bildo

17). Fine frotu de post la orelo malsupren (Bildo 18). Faru tion multajn fojojn.

XII. Frapeto post la oreloj. Forte premu per la du manplatoj la orelojn kun la fingroj malantaŭen kaj la montraj fingroj sur la mezaj. Frapetu per la montraj kaj mezaj fingroj la okcipitalon multajn fojojn (Bildo 19 kaj 20).



17



18



19



20

XIII. Masaĝo de la okuloj. Faru la maldekstran manplaton konkava kaj la dekstran konvekso. Frotu ilin reciproke ĝis varmiĝo (Bildo 21). Frotu per la dekstra manplato de la nazo ĝis la okulrando (Bildo 22) kaj



21



faru la samon per la maldekstra manplato. Faru tion alterne per la du manoj. Fermu la okulojn dum la frotado.

XIV. Froto de la nazo. Premu per la du manoj la vizaĝon kun la malgrandaj fingroj forte sur la nazloboj. Puŝu la manojn supren kaj malsupren multajn fojojn (Bildo 23).



23

XV. Kunfrapado de dentoj. Sidu kun la du kruroj interkrucitaj kaj manoj antaŭ la ventro. Knedu per la dikfingra pinto radikon de la ringfingro. Fermu la buŝon kaj subtenu per la langopinto la supran makzelon. Kunfrapu la dentojn samkiel en maĉado, sed milde kaj malrapide por ne malutili al la dentoj. Faru tion multfoje ĝis ekskreciiĝo de salivo, englutu ĝin malrapide per kelkaj fojoj (Bildo 24).



24

XVI. Spirado. Etendu la du brakojn ambaŭflanken, horizontale por ke la brusto larĝiĝu. Faru profundan spiradon



25

kelkajn fojojn starante aŭ sidante (Bildo 25).

# Printempa Festo



La Printempa Festo, novjaro laŭ la ĉina luna kalendaro, estas la plej grava tradicia festo de la ĉina nacio. Antaŭvespere de la festo la tuta familio kolektiĝas kaj ĉe komenco de la nova jaro oni reciprokas sincerajn salutojn, faras celebradon per drako-lanternoj, ludo de leon-danco kaj aliaj amuzadoj. La 29-an de januaro 2000 la Ŝtata Poŝta Buroo de Ĉinio emisiis specialan poŝtmarkoserion el tri pecoj kaj unu poŝtmarko-blokon titolitan "Feliĉa Familio".



Akvofalo pendants de sur alta monto

Foto de LIU SIGONG

ISSN 0032-4361



9 770032 436009

09>

世界语《中国报道》二〇〇〇年第九期  
(本刊代号: 二一九一五) 国内统一刊号: CN11 1339/G2